

ESPERANTO

JULIO / AŬG. 1960

53 a Jaro - N-ro 656-7 (7-8)



esperanto

JUL./AŬG. 1960

53 a J A R O

REVUO INTERNACIA N-RO 656-7 (7-8)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro : S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represadon al nia redakcio.

Jara abono (1960) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAĜA BILDO :

La konstruaĵo de la Eŭropa Konsilantaro en Strasburgo.

Enhavo

La Internaciaj Lingvo-Problemoj . . .	121
Aprilo	122
Bona Decido	123
Medicina Terminologia Centro	124
3-a UK de la Popolaj Universitatoj . .	124
Aŭstria Federacio Esp. Ferv.	124
Mondotrafiko kaj Esperanto	125
Hispanujo	126
Esperanto-tagoj en Miskolc	126
Kulturaj Interŝanĝoj	127
La Informa Laboro	129
Ĉina Ĝentileco	132
Danlando	133
Prelegvojaĝo de D-ro Hamvai	138

Rubrikoj :

Radio	126
CED	128
La Juna Vivo	133
16-a Int. Junulara Kongreso	134
Novaj Libroj	134
Belartaj Konkursoj 1959	135
La int. Konkursoj	137
45-a UK	138
Oficiala Informilo	139

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

La internaciaj lingvo-problemoj en okcidenta Eŭropo

Pro la granda propaganda bruo por la angla lingvo povus ŝajni, ke en la okcidenta Eŭropo tiu idiomo havas la saman rangon kiel la rusa en Oriento. Tamen ne estas tiel. En la okcidenta Eŭropo ne ekzistas multnacia federacio, sur kies teritorio oni jam devis solvi la problemon de la lingvo-aplikado helpe de komuna idiomo, eĉ ne en la Helvetika Konfederacio (Svislando). Tie oni simple allasis egalrajte ĉiujn kvar en la tuta lando parolatajn lingvojn. Tial pri neniuj nacia lingvoj oni povas diri, ke pro politikaj kialoj ĝi devas esti lernata senescepte en ĉiuj lernejoj de ĉiuj ŝtatoj en la okcidenta Eŭropo, kvankam nuntempe la angla estas la plej preferata pro la politikaj cirkonstancoj, karakterizitaj per la restado de angle parolantaj trupoj sur la kontinento kaj ŝrumpo de la politika influo de la iamaj kontinenteŭropaj potencoj: Francujo, Germanujo kaj Italujo. En NAPO (Nordatlantika Pakt-Organizo) kie la angle parolantaj mondpotencoj Usono kaj Britujo ludas la gvidantan rolon, la franca estas oficiala lingvo apud la angla, dum tiu lingvo estas la ununura ĉe la aviadila trupo de NAPO. Spertoj dum la manovroj de la NAPO-trupoj en Germanujo montris, ke la lingva interkompreno nur malbone funkcias kaj ke angle donitaj ordonoj al germanaj trupoj estis miskomprenataj. Pri tiaj "akcidentoj" la gazetoj regule plendas post la manovroj.

Ke la angla lingvo ne estas la ununura solvo de la lingvoproblemo en Eŭropo montris sin tuj, kiam temis pri la lingvoreguligo en la eŭrop-federalistaj institucioj por la unuigo de Eŭropo. El la iom longa listo de ili mi mencias nur tiujn, kiuj rekte akcelas aŭ estis akcelontaj la eŭropan integriĝon. En la *Eŭropa Konsilantaro de Strasburgo*, al kiu dekkvin ŝtatoj nun apartenas, sed kiu havas nur konsultan karakteron, do ne memstaran leĝdonrajton — grava obstaklo ankaŭ por la fina solvo de la lingvo-problemo —, la angla kaj la franca estas la oficialaj kaj la laborlingvoj. En la Konsulta Asembleo de la Konsilantaro oni rajtas paroli ankaŭ germane, sed tradukoj en la germanan lingvon ne okazas. Cetere la germane parolantaj delegitoj jam de la aliĝo de Aŭstrujo energie klopodas akiri plenan oficialiĝon ankaŭ por la germana lingvo. Ili nerefuteble povas argumenti, ke la germane parolanta popolgrupo estas la plej multnombra en Eŭropo. Ĝis nun ili ne sukcesis pro la obstina rezisto de la jam privilegiitaj franca kaj angla nacioj. En la sesopaj *Komunumoj por Karbo kaj Ŝtalo*, por *Komuna Merkato* kaj por *Atom-Energio* ni vidas alian bildon. Tie mankas la angloj, ĉar membroj estas nur la Beneluksa Ŝtatgrupo, Francujo, la Federacia Respubliko Germanujo kaj Italujo. Tial en la sesopaj komunumoj oni povis solvi la problemon en vere demokrata maniero laŭ la principo de egalrajteco. Ne preferante ies lingvon oni faris oficialaj la kvar lingvojn de la membroj-ŝtatoj, nome la francan, germanan, italan kaj la nederlandan. Kompreneble tiu solvo postulas grandan teknikan aparaton kaj multnombrian tradukistan stabon. Krome la lasta kosto la konsiderindan sumon de 20 procentoj de la salajra buĝeto. Preskaŭ plenan egalrajton kaj en certa grado modelan solvon de la lingvo-problemo oni alstrebis en la ne realigita kontrakto de la jaro 1952 pri la *Eŭropa Defenda Komunumo* por la samaj ses eŭropaj ŝtatoj. Lasante al ĉiuj naciaj kontingentoj iliajn lingvojn oni antaŭvidis la francan lingvon nur por la gvidanta instanco, la Komisariato, sed cetere oni destinis, ke informoj al kaj de subaj unuoj devas esti donataj en la lingvo de la suba unuo. Krom tio oni antaŭvidis ankaŭ la enkondukon de komuna helplingvo (*langue auxiliaire*) por radio-

Unu mondo, unu lingvo, unu mono

Kelkajn jarojn post la milito, *Universala Ligo*, la mondorganizo por Mondfederalismo, kies sola oficiala lingvo estas la mondlingvo Esperanto, skribis la suprajn vortojn en sian blazonon kaj, konsekvence, starigis la internacian monunuon, la stelon. Kiu deziras scii pli multe pri tio, facile trovos detalojn en la *Almanako de U.L.*, ricevebla ĉe ĝia oficejo en Hago, *Riouwstraat 172*. Ĉi tie ni nur konstatu ke la stela monsisistemo multe simpligis la monajn aferojn en internaciaj rilatoj esperantistaj, ke la sistemo estas hodiaŭ larĝe uzata ankaŭ ekster U.L. kaj ke la stelo en la pli ol dek jaroj de sia funkciado montriĝis solida kaj fidinda monunu.

Ĝis nun la stelo estis uzata nur en formo de kupono kaj tiel servas kiel pagilo tra la tuta mondo, same kiel la respondkupono. Granda avantaĝo super la lasta estas, ke la valoro de la respondkupono estas tre diferenca laŭ aĉet- kaj vendoprezo, dum la stelo havas ĉiam la saman valoron. Miloj da stelokuponoj dissendiĝas tra la mondo por pagi aĉetojn en plej diversaj landoj. Ankaŭ U.E.A. regule enspezas kaj elspezas ilin.

Estis ĉiam la intenco ke la stelo uziĝu ankaŭ en formo de moneroj. Por kontribui sian parton al la honorigoj dum la *Zamenhof-Jaro*, la Estraro de *Universala Ligo* decidis realigi tiun intencon, kaj farigis monerojn de unu, kvin kaj dek steloj. La unuaj ekzempleroj de tiuj moneroj estis solene transdonitaj de la Estro de la Ŝtata monfarejo Nederlanda al la Estraro de U.L. en la personoj de la vic-prezidantino S-ino Julia Isbrucker kaj la sekretario S-ro Andreo Cseh. Tio okazis la 28-an de junio 1960.

Baldaŭ nun ĉi tiu internacia mono, surhavanta tekston en la Internacia Lingvo, ruliĝos tra la manoj de internacia popolo, la esperantistaro. En kongresoj, konferencoj kaj kiaj aliaj internaciaj renkontiĝoj esperantistaj la internaciaj moneroj povos servi kiel plenvaloraj pagiloj. La moneroj, kies bildon oni trovas aliloke en ĉi tiu numero, estos riceveblaj ankaŭ en la Brusela Kongreso. Ni varme rekomendas al la tutmonda esperantistaro larĝe uzi la stelon kiel pagilon, ĉu kiel kuponon aŭ kiel moneron ĉar ju pli vaste disvastigita ĝi estos tra la mondo, des pli konvinke pruvigis antaŭ la neesperantista publiko ĝia praktika valoro. La cirkulantaj moneroj estos, same kiel la kuponoj, plene kovritaj de nederlanda valuto en banko.

La eldoninta organizaĵo kaj precipe la elpensinto de la ideo, Andreo Cseh, meritas la grandan dankon de la tuta esperantista mondo por ĉi tiu epokfaranta ago kaj plej digna honorigo de la centjara datreveno.

M. H. V.

informoj, kodo kaj lozungoj kaj por kazoj, kie la uzo de alia lingvo kaŭzus malfacilaĵojn. Povas esti ke la redaktoroj de tiu kontrakto pensis, uzante la esprimon helplingvo, pri planita lingvo kia estas Esperanto. El tiuj faktoj evidentiĝas, ke la angla lingvo ne havas firman pozicion sur la kontinento, kie pro tradicio multaj preferas la germanan aŭ la francan lingvojn. Sed la angla havus nenian ŝancon, se oni volus prezenti solvon, kiu estas samtempe akceptebla ankaŭ flanke de la orienteŭropaj nacioj. Kvankam tie la rusa lingvo intertempe gajnis terenon, la germana lingvo estas vaste disvastigita. Cetere la Strasburgaj eŭropfederalistaj politikistoj neniam povos pretervidi ankaŭ la interesojn de la nacioj en orienta Eŭropo. Tial la angla lingvo neniam estos la komuna lingvo de la Eŭropanoj.

En la kadro de la Eŭropa Konsilantaro jam tre frue oni ekkomprenis, ke politike unuigita Eŭropa Kontinento ne povas malhavi komunan lingvon. Por komunaj administraj taskoj, por la armeo, por la trafiko kaj komerco, por la personaj rilatoj inter la diverslingvaj civitanoj, kaj fine kaj ne laste kiel rimedo por psikologia integriĝo. Eŭropo bezonas komunan lingvon por fine fari sian lingvo-pacon, ĉar la unuiĝo de Eŭropo devas enterigi unufoje por ĉiam la ĝisdatan fatalan rivaladon inter siaj lingvoj-nacioj. Tiu paco estos sekura nur helpe de iuspeca propra idiomio kiu apartenas egalrajte al ĉiuj nacioj, dum la naciaj lingvoj restu senĝenata propraĵo de la unuopaj popoloj.

Certe tiaj konsideroj okupis la mensojn de la delegitoj en la grupo, kiu 1952 rekomendis al la Eŭropa Konsulta Asembleo la anglan-francan dulingvismon. La franca delegito pledis por tiu solvo dirante: "Temas pri tre grava problemo por Eŭropo, nome pri la eblecoj, kiuj devas ekzisti inter niaj nacioj, por ke ili povu interkompreniĝi. Nur de la amplekso, en kiu la granda amaso — ne nur malgranda elito — povos pli bone interkompreniĝi, dependos, ĉu nia unuiĝo estos solida kaj fruktodona. Tial li proponis, ke la Angloj lernu la francan, la Francoj la anglan, kaj la aliaj Eŭropanoj eble ambaŭ lingvojn. Kial? Lia respondo: "Komuna lingvo ekestigus inter la diversaj membroj-ŝtatoj unuecan spiritan sintenadon kaj kulturon," kaj "Post la dua mondmilito la angla lingvo akiris privilegiitan pozicion, dum pro sia klareco, logikeco kaj subtileco la franca lingvo estas nepre necesa kiel rimedo por kuniĝo de ŝtatoj, kiuj intencas unuiĝi por defendi sian specialan formon de pensado kaj kulturo kaj sian propran koncepton pri libereco", kaj "la kunmarŝado de ambaŭ lingvoj estas nuntempe la plej konvena kaj plej akceptebla solvo" (en la angla teksto ni legas "the fairest and the most appropriate way"). La dulingvisma grupo devis fiaski, ĉar ĝi volis atingi bonan celon per malbonaj rimedoj. Nur pene la argumentado vualas naciismajn egoismon kaj politikan arogantecon kaj ne povas kaŝi la hipokritan malrespekton kaj rigoran malatenton de la plej elstara demokrata principo: la egalrajteco de ĉiuj nacioj. Tial la kontraŭuloj ne bezonis multan penon por resendi la mocion pri la dulingvismo en la kulturkomisionon kaj tie finfine enterigi ĝin por ĉiam, ĉar por farsigi la aferon germanaj kaj italaj delegitoj postulis, ke oni plimultigu la dulingvismon en tri- aŭ kvarlingvismon helpe de iliaj lingvoj.

Kvankam jam dum la debatoj pri la dulingvismo en 1953 germana delegito sugestis esplori, ĉu Esperanto povos doni taŭgan kaj akcepteblan solvon, la Kulturkomisiono okupis sin denove nur en la jaro 1956 pri la lingvo-problemo, post kiam dekkvar delegitoj estis prezentintaj rekomendproponon, kiu celis eksperimentan instruadon de la Internacia Lingvo. La propono antaŭvidis, ke unue en kvar aŭ kvin membroj-ŝtatoj Esperanto estu instruata en po unu klaso dum unu jaro, por ke surbaze de la rezulto la kulturkomisiono povu fari siajn decidojn. Tiu modesta propono estis dufoje rifuzita per egalnombro de la voĉoj donitaj por kaj kontraŭ. La protokoloj de la Kultur-

Belarta Konkurso 1959:
tradukita poezio:
2-a premio

ANDRE RIVOIRE

Aprilo

*La malfermotan frumatene,
Fenestron frapas jam sunbrilo.
"Ĉar renaskiĝis ĵus Aprilo,
"Eniru bona suno bene!"*

*Ĉi-hore, sub venteto-paso,
Sur arbo trema vidas oni
Elŝpruci, rompe elburĝoni
Folion verdan el atlaso,*

*En branĉoj kiom da trildiroj!
En la aero da odoroj!
Per blankaj kaj helruĝaj floroj,
Kovritaj estas la spaliroj!*

*Monato kiu vivon vokas,
Monat' ridema, ĝojohava!
Per ĝi varmiĝas koro rava!
Ĝi en okulojn, flamon lokas!*

*Al vintro, diras ĝi: "Formortu!
Printempo devas lokon trovi!
Vi ne plu devas froston blovi,
Ventegon, neĝon, vi forportu!"*

*Sur sojlo de domet' kampara,
la malriĉul' ne pli suferas,
Ĉar al li varmon vi oferas,
Kaj lumon, ho monat' bonfara!*

*Venkinto de l' sezon' malvarma,
Saluton! pelu tagojn sombrajn
Alportu al ni rozojn nombrajn
Aprilo juna, verda, ĉarma!*

*Natur' sub via kiso prema,
Dormadon pezan lasu foran;
Preparu spikon brile oran,
Esperon de rikolto vena!*

*Kiam revenas vi, Monato,
Plej bone rimas la poetoj!
En la arbaroj, violetoj
Naskiĝas, kaj en koroj, bato!*

*Aprilo, ho Printempo, florojn
Plenmane, kun la lumo semu
kaj ĝojo kaj boneco venu
En ĉiujn niajn homajn korojn!*

Trad. de Lucien Thévenin

BONA DECIDO GRAVA ALVOKO

La ĵurnalo "L'ECLAIR", eldonita en la provinca urbo NANTES (Francujo) decidis reaperigi Esperanto-Kronikon en franca lingvo.

L'ECLAIR jam estas konata pro sia simpatio al Esperanto. Antaŭ kelkaj jaroj regula kroniko aperis en ĝiaj kolumnoj. Sed pro diversaj malfacilaĵoj ĝi devis ĉesi, kaj ĝi akceptis nur temp' al tempe mallongajn artikolojn.

Do estas por ni tre bona decido kiu venas ĝustatempe por helpi nian propagandon favore la Esperanto. Tiu kroniko aperos laŭeble ĉiusemajne.

La 1-a de nova serio aperis la 15-an de decembro 1959 (memortago) sub tre larĝa titolo:

"Memordato por la geesperantistoj:

Antaŭ 100 jaroj, la 15-an de decembro 1859, naskiĝis L. L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, la Internacia Helplingvo."

Tiu kroniko estis tre bone prezentita, tri kolumnojn larĝa kun bela portreto de Zamenhof.

Aperis ankaŭ:

— la 2-a kroniko (23-an de decembro) "Esperanto estas ne nur mirinda ilo, sed ankaŭ tre nobla arto."

— la 3-a (5-an de januaro) "Esperanto sur la radiondoj". Kaj poste:

— Esperanto tra la mondo,

— Ĉu Esperanto-lernado estos deviga?

— La vera dulingvismo: nacilingvo-Esperanto,

— Bruselo, la ĉefurbo de la esperantista mondo,

— La fakaj asocioj de UEA.,

— Literaturo kaj Esperanto,

— La Esperanto-movado.

k.t.p.

De tempo al tempo, almenaŭ ĉiumonate la redaktoro intencas prezenti sub la titolo "Esperanto tra la mondo" ĉiujn gravajn informojn pri la Esperanto-movado tra la mondo. Tiuj informoj devos montri al la legantaro, ke Esperanto ne estas amuzaĵo por iuj ajn senlaboruloj, sed tre grava utila afero, la sola ŝlosilo kiu permesas ĉiujn internaciajn kontaktojn.

Redaktos tiun kronikon la fakdelegito de UEA, en Saint-Nazaire (Francujo), kaj por tiu laboro li bezonas multajn informojn el ĉiuj partoj de la mondo, kaj li alvokas ĉiujn esperantistajn mediojn por ke ili al li sendu tiajn informojn, se eble kun taŭgaj fotografiaĵoj (nigraj-blankaj) por ilustriti la informojn.

Kiu deziras ricevi provekzempleron de la ĵurnalo ne forgesu aldoni al sia sendaĵo unu respondkuponon internacian. Krome oni petas ĉiujn informilojn represigi tiun alvokon. Sendu informojn al la sekvanta adreso:

U.E.A. Fakdelegito Bonamy

7 boulevard Mermoz

Saint Nazaire (Loire-Atl.) Francujo

komisiono ne estas alireblaj al la verkinto. Ili estas konfidencaj. Tial li scias nenion el oficialaj fontoj pri la kialoj de la kontraŭuloj. Sed kio ajn estas en la protokolo, kion li eksciis alimaniere pli bone prilumigas la sintenadon inter la delegitoj. Niaj kontraŭuloj precipe timas, ke post enkonduko de Esperanto oni ne plu lernos fremdajn lingvojn, ĉar laŭdire ni intencas forigi la studadon de ili el la lernejoj. Tio tute ne estas vera. Ni strebas nur forigi el la lernejoj la senfruktan kaj superfluan lernadon de fremdaj lingvoj, ĉar lingvo-studado per si mem ne klerigas la lernanton. Studado de fremda nacia lingvo en la popollernejoj estas pedagogia kaj filologia ĉarlatanaĵo, ĉar post nur tri- aŭ kvarjara studado la rezultoj estas ridinde etaj kaj neniel valoras la penon kaj kostojn. Tial tie la instruado de fremda nacia lingvo ĝenerale neniam povas peradi al la lernanto la kapablon buŝe kaj skribe uzi la lingvon kaj senĝene legi kian ajn tekston, dum trijara Esperanto-instruado garantius ne nur tiun kapablon, sed ankaŭ konatigus la lernantojn kun la granda amaso da fremdvortoj, kiuj troviĝas en ĉiu nacia lingvo. Krome ĝi donus al ili la konvinkon vere posedi fremdan idiomon. Esperanto-instruado havus do pli grandan ĝenerale klerigan efikon. En la mezlernejoj kaj gimnazioj estus pli bone allasi la studadon de nur unu fremda nacia lingvo krom la deviga instruado de Esperanto. Tiam en la mezlernejoj estus pli da tempo por la studado de la natursciencoj. En la nuntempo ili estas pli gravaj ol kono de gramatikoj. Tial en ĝenerala intereso ni postulas la limigon de la studado de fremdaj lingvoj ĝis la nepre necesa minimumo. Tiun sanan principon jam delonge la privilegiitaj nacioj (Angloj kaj Francoj) en certa grado praktikas en siaj lernejoj. Tial iliaj reprezentantoj ne vidas kialon favori la ideon pri neŭtrala, facile lernebla komuna lingvo, por ne perdi la avantaĝon, kiun ili havas antaŭ la aliaj nacioj, precipe antaŭ la malgrandaj. Sed ĉar inter la lastaj ĉiam troviĝas satelitoj, la privilegiitaj naciaj povos facile bari la vojon al Internacia Lingvo, por konservi sian lingvan hegemonion.

Post la malsukcesinta paŝo por eksperimenta instruado ni devis atendi plurajn jarojn antaŭ ol ni rajtis esperi, ke nova iniciato havos pli bonan ŝancon. Ni opiniis nepre necese, konvinki la Kulturkomisionon, ke komuna lingvo ne estas postulata nur de esperantistoj, sed ke temas pri ĝeneralaj deziro kaj bezono de la eŭropa popolo. Speciala fondita Urbestra Komitato en la jaro 1958 aranĝis enketon inter la eŭropaj urbestroj pri la lingvo-problemo. Estis forsendita demandilo al ĉirkaŭ 3000 urbestroj en 15 landoj. Pli ol 700 urbestroj respondis, inter ili pli ol 600 jesante la prezentitajn demandojn: Ĉu komuna lingvo estas necesa kaj dezirinda, ĉu politike neŭtrala kaj facile lernebla lingvo, kia estas Esperanto, povus doni akcepteblan solvon kaj ĉu la Urbestra Komitato petu la Eŭropan Konsilantaron ke oni helpe de speciala komisiono studu la problemon kaj ĝian eblan solvon per la Internacia Lingvo. Detalan raporton pri la enketo kun koncerna petskribo la prezidanto de la Urbestra Komitato persone transdonis en Strasburgo dum la pasintjara printempa sesio de la Konsulta Asembleo. Unue la Kulturkomisiono reagis negative, sed post persona interveno de nia Ĝenerala Sekretario Prof. Lapenna ĉe la Prezidanto de la Kulturkomisiono komence de 1960 oni metis la aferon "lingvo-problemo" denove sur la tagordon. Kia estos la rezulto de la novaj pritraktadoj, neniue povos antaŭdiri, ĉar en ĉiu politika instanco la decidoj tre ofte dependas de momentaj aŭ hazardaj cirkonstancoj.

Nu, se ankaŭ ĉifoje la instancoj de la Eŭropa Konsilantaro preferus rifuzi niajn proponojn, iliaj membroj estu certaj, ke ni esperantistoj neniam rezignos je nia historia misio: solvi per nia internacia idiomato la lingvo-problemon ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en la tuta mondo.

D-ro W. Herrmann

MEDICINA TERMINOLOGIA CENTRO

En la kadro de T.E.K.A. (Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio) estis starigita Medicina Terminologia Centro (M.T.C.). Ĝia Direktoro estas D-ro Andreo ALBAULT, 8 Av. Et. Billières, Toulouse, Francujo.

M.T.C. volas esti centro por kolegoj, kiuj deziras publikigi Esperanto-resumojn aŭ Esperanto-originalaĵojn en la profesia gazetaro aŭ libroforme kaj kiuj sekve frontas terminologiajn problemojn. La Centro ebligas diskonigi spertojn, kunligi la klopodojn kaj evoluigi la faklingvon.

M.T.C. alvokas ĉiujn bonvolajn kolegojn al kunlaboro. Kiel kunlaborantoj jam anoncis sin, inter aliaj, Prof. CANUTO kaj Prof. NISHI.

M.T.C. starigis provizoran laborplanon, kiu inkludas publikigon de informoj pri aperantaj resumoj, verkoj, vortaroj; terminologian laboron; organizan laboron kun la celo multigi la Esperanto-resumojn. Tiu plano detale aperos en la faka organo ("Medicina Revuo").

Konstanta Enketo pri Esperanto-resumoj

Pli ol 40 medicinaj revuoj jam aperigis Esperanto-resumojn pli malpli regule. Nepre necesas ke ni ekzakte konu la nunan staton kaj tial M.T.C. alvokas ĉiujn kuracistojn kaj najbarajn profesiojn (dentistoj, farmaciistoj, ortopediistoj, ktp) res-

pondi al la konstanta enketo pri Esperanto-resumoj. Temas esklude pri la Esperanto-resumoj kiujn la *Redakcio mem aldonas*, kaj sekve kiuj aperas konstante en la koncernaj revuoj. Prefere la resumotradukanto mem respondu — plej precize — al jena demandaro:

A.-*La Revuo* 1. Titolo (Ne traduku ĝin!). — 2. Traduko de la titolo aŭ indiko pri la enhavo, laŭ la kazoj. — 3. Redakcia adreso. — 4. Pojara kajero-nombro; paĝonombro en la pasinta jaro; formato (larĝo kaj alto per centimetroj). — 5. Abonprezo por eksterlando; adreso kaj poŝtĉekkonto. — 6. Prezo de ekzemplero por eksterlando. — 7. Lingvo(j) uzata(j) por la artikoloj.

B.-*La Resumo* 1. Ĉu ĝi estas *traduko* de naci-lingva resume, aŭ resume *rekte verkita* en Esperanto. — 2. Ĉu estas resume en tria lingvo? Se jes, en kiu(j)? — 3. De kiam aperas tiuj Esperanto-resumoj?

C.-*La Resume-zorganto*: Titolo, Nomo, Adreso; eventuale fako.

La detaloj de tiu enketo aperos en "Medicina Revuo"; la rezultoj estos komunikataj al la Centro de Esploro kaj Dokumentado kun kiu M.T.C. kunlaboras; resume aperos en "Esperanto" en utila tempo.

3-a Universala Kongreso de la Popolaj Universitatoj en Strasburgo la 9-12 septembro 1960

La 3-a Universala Kongreso de la Popoluniversitatoj okazos en Strasburgo de la 9-a ĝis la 12-a de Septembro 1960 en la Palaco de la Universitato.

La Organiza Komitato de tiu konferenco enhavas du esperantistojn: S-ro Pierre PETIT, prezidanto de la Eŭropaj Popolaj Universitatoj, komitatano de UEA estas vic-prezidanto kaj S-ro Hubert FERREZ, helpĝenerala sekretario.

Plej gravaj personoj de la Universitataj medioj kaj de la Eŭropa Konsilantaro partoprenas la organizan komitaton.

Esperanto estos unu el la oficialaj lingvoj por la preparo de la konferenco. En la du antaŭaj konferencoj, Esperanto estis la nura traduklingvo. Povus okazi same en Strasburgo, kondiĉe ke kiel eble plej da delegitoj scipovu Esperanton.

Tiucele ni rekomendas al la esperantistoj, kiuj havas rilatojn kun la Popoluniversitatoj, ke ili petu de ili la reprezentigon en Strasburgo.

Pri detaloj skribu al S-ro Hubert FERREZ, helpĝenerala sekretario de la Organiza Komitato por la 3-a Universala Kongreso de la Popoluniversitatoj, 9, place de l'Université, STRASBOURG (Bas-Rhin) Francujo.

Aŭstria Federacio Esperantista Fervojista Wien Postamt 76, Schliessfach 117

La fervojistoj altetenas la Esperantan standardon ankaŭ en Aŭstrujo

El la ĝisnuna fervojista fakgrupo en la kadro de Aŭstria Esperantista Federacio (AEF) la 10-an de Aprilo 1960 okazis en Linz ĝeneralkunveno, dum kiu estis fondita memstara "Aŭstria Federacio Esperantista-Fervojista" (AFEF) kiel landa organizo de Internacia Federacio Esperantista Fervojista (IFEFF). Kompreneble kunlaboro kun AEF en la intereso de la movado estos daŭrigata.

Post la raporto de la ĝisnuna estraro okazis la elekto de la estraro de AFEFF. Laŭ la propono de la Linz-aj gekolegoj, ke la sidejo de la nova organizo estu en la ĉefurbo Wien, okazis jena elekto: Prezidanto, Ing. Erich Eichinger; Vicprezidanto, Ing. Walter Huber; Sekretario, Ing. Wilhelm Hermann; Vicsekretario, Raimund Spitzer; Kasisto, Rudolf Zanko; Vickasisto, Josef Hacla; Redaktoro, Ing. Erich Eichinger; Kontrolantaj, Emmerich Essler kaj Karl Klumair.

Post la pli serioza parto de la festo — salutoj de diversaj eminentuloj, festparolado de la Honorprezidanto kort kons. Hugo Steiner, sekvis bela programo de eminentaj artistoj.



La Direktoro klarigas la funkciadon de nova aeroplano al Joŝiko Kaĵino.

MONDOTRAFIKO kaj ESPERANTO

La japana ĵurnalistino Joŝiko Kaĵino vizitis en majo britan fabrikon de aeroplanoj.
La vizito inspiris ŝin por jena artikolo.

La trafikiloj rapidege evoluas. Precipe progresas la internacia trafiko per aeroplanoj. La evoluo de la tekniko daŭre mallongigas la distancojn de Oriento al Okcidento. Ekzemple mi antaŭ tri jaroj flugis de Tokio al Kopenhago, trans la Nordan Poluson, en la daŭro de 30 horoj. Por la sama distanco oni bezonas hodiaŭ malpli ol 20 horojn. Tio signifas, ke se vi adiaŭas la Eifelturon de Parizo frumattene, vi jam vespere povas gustumi veran japanan manĝaĵon per bastonetoj kaj kuŝi sur speciala japana tapiŝo TATAMI.....

Oriento kaj Okcidento kunigitaj per moderna trafikilo, do la nuntempa vivo estas vere internacia pro la nekredebla teknika evoluado, kaj ni tial bezonas internacian lingvon — ni devas utiligi Esperanton.

Prof. Downes, membro de la Akademio de Esperanto, kaj mi estis akceptitaj en la fabriko kiel gravaj personoj, i.a. eble ĉar la japana registaro ĵus mendis ĉe la fabriko novajn tre potencajn motorojn. Mian konversacion kun la Direktoro de la fabriko interpretis Prof. Downes. La Direktoro komplezeme esprimis sian koncepton pri la Internacia Lingvo en jena maniero: "Ŝajne Esperanto funkcias kun la sama rapideco kaj benefiko kiel niaj novaj motoroj!" Cetere la Direktoro interesis sin pri la ebleco de komerca aplikado de Esperanto, ĉar la fabriko bezonas mondiskalan merkaton.

La fabriko havas kolezion por 1000 studentoj, kiuj laboras praktike laŭ moderne organizita eduk-sistemo. La studoj daŭras 4 jarojn, kaj la semajna salajro estas 3 ĝis 7 anglaj pundoj.

En la fino de nia interparolado ni diskutis la malfacilaĵojn de vojaĝkostoj pro la novaj motoroj, kiuj postulas nur malmultan benzinon. Kun la venontaj novaj traktatoj inter la internaciaj trafikorganizoj estos eblecoj por organizi mondvojaĝon kun granda rabato, tiel ke multaj esperantistoj povos viziti la projektitan U.E.A.-kongreson en Japanujo en

1965. Tiel la evoluo de la moderna tekniko kreas avantaĝojn ankaŭ por pli facila, pli malmultekosta kaj pli rapida komunikado por ni esperantistoj.

Mi sugestas, ke la esperantistoj daŭre klopodas propagandi ĉe la internaciaj aerkompanioj, inter kiuj jam K.L.M., A.F. kaj S.A.S. eldonis broŝurojn. Man-enmane devas progresi la tekniko kaj Espe-



Aeroplano rapide flugas per nova motoro.

ranto. Dum vojaĝo per aeroplano ne ekzistas landlimoj. Ni traflugas rapide landon post lando. Tre rapide ni devas ŝanĝi lingvon — se ni kapablas. Por tia internacia vojaĝo oni nepre bezonas internacian lingvon.

Tion ni devas fari evidenta por aliaj homoj. Ni devas evoluigi la homan senton por internaciismo, fari evidenta ankaŭ, ke Esperanto estas taŭga ilo por progresigi la amikecon inter nacioj kaj popoloj.

Joŝiko Kaĵino

Hispanujo

XXI-a Hispana Kongreso de Esperanto. — Ĝi okazos de la 21-a ĝis la 24-a de julio en la nord-okcidenta urbo Pontevedra.

La programo ampleksas inter aliaj eroj: Inaŭguro de Ekspozicio; akcepto de la Aŭtoritatoj kaj lunĉo; folkloraj prezentadoj; prelegoj; ekskurso al la insulo LA TOJA, k.t.p.

ESPERANTO-TAGOJ EN MISKOLC HUNGARUJO

La 5-an de majo la tri lokaj grupoj en kadro de modesta manĝeto kune solenis la 50-jaran esperantistecon de **Ludoviko Király**, eksdirektoro de ekonomia gimnazio, delegito de U.E.A. per salutparoloj, florbukedoj kaj donaco de memorlibro. La loka radio memorigis pri la jubileo.

La 14-an kaj 15-an de majo okazis ankaŭ en Miskolc la 3-a Nordhungarlanda Esperanto-Renkontiĝo, kiu efektive fariĝis landa renkontiĝo. Ĝin partoprenis pli ol 300 esperantistoj el ĉiuj partoj de la lando. Tiu estis la plej vizitata kunveno en la historio de la hungara Esperanto-Movado, krom la Universala Kongreso en Budapeŝto en 1929. Plej elstara punkto de la Renkontiĝo estis la festkunveno en la festsalono de la Urba Konsilantaro. En la nomo de la Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro festparolis ĝia prezidanto **Julio Baghy**, kiu inter aliaj per varmaj salut- kaj dankvortoj memorigis pri la 50-jara poresperanta laboro de Ludoviko Király sekva de tondrega aplaŭdo de la ĉeestantaro.

Dum la renkontiĝo funkciis okaza poŝtoŝtanco, oni aranĝis multe vizitatan ekspozicion, okazis fakkunsidoj de la pacmovado, de virinoj, junuloj kaj de la fervojistoj. 50 gesamideanoj faris ekzamenojn pri parolkapableco, kaj 3 samideanoj pri kursgvidado.

La duan tagon de la Renkontiĝo okazis inaŭguro de **Zamenhofstrato** (Esperanto-placo jam estis inaŭgurita en 1957). Post enkonduka esperantlingva parolo de Ludoviko Király en la nomo de la Landa Esperanto-Konsilantaro parolis hungarlingve Ludoviko Kókény. En Lillafüred okazis inaŭguro de **Esperanto-fonto**. La inaŭguran parolon faris Ludoviko Király kaj ĝin sekvis deklamo de esperantisto el Nyiregyháza, kaj finis la solenon la kanto de la 6 kaj 8 jaraj genepoj de Ludoviko Király, **Ildoko kaj Levente**. Ili prezentis hungaran popolkanton esperantigitan de Kalocsay kaj gajnis elkoran aplaŭdon de la ĉeestantaro. Per rigardo de la vidindaĵoj de Lillafüred finiĝis la Esperanto-tagoj, kies ĉiujn aranĝojn ĉeestis ankaŭ multaj neesperantistoj kun granda intereso.

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiutage	15.30-16.00	Mallongigoj : I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso. Warszawa, 249m. (1205 kcs), 42.11m, 31.50m, 31.45m, 31.01 m, 25.42m, 25.16m, 25.09m. P. Pola Radio, ul. Noakowskiego 24, Warszawa, Pollando.
	Dimanĉo 10.50-11.00	Natal, 236m. (1270 kcs), 60.79 m. k. Radio Potí, Av. Deodoro 245, Natal, Brazilo.
	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. (1520 kcs). K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00-19.25	Sofia, 41.35m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	22.30-22.55	Sofia, 41.35m, 39.11 m, 30.93 m. P.
	23.35-23.55	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo varia dum unuhora diverslingva programo).
	00.45-01.00	Juiz de Fora, 60.91m. I.P. Rádio Industrial, Rua Batista de Oliveira, 745, Juiz de Fora (Minas Gerais), Brazilo.
	17.30-17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 16.87m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
Mardo	18.10-18.30	Valencia, 233m. (1285 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
	02.00-02.30	Caracas, 476 m. (630 kcs), 48.62 m. P. Radiodifusora Nacional, Caracas (Venezuelo).
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. (D-ro Baur).
Merkredo	16.40-16.50	Wien. 513m. (584 kcs), 293m., (1025 kcs), 48m., 41m., 30m., 25m., 16m., 11m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	23.00-23.15	Guatemala, 470m. (640 kcs), 48.54m, 30.98m. I.K. Radio Nacional T.G.W., Guatemala Cd, Mezameriko.
Ĵaŭdo	08.30-08.40	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs). K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat).
	22.00-22.15	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	São Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso, São Paulo, Brazilo.
Vendredo	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	20.00-20.15	Vigo, 277m. (1082 kcs). K. La Voz de Vigo, Vigo, Hispanujo.
	22.00-22.10	Hilversum 402m. (746 kcs). I., V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Sabato	12.45-13.00	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs) 31.42 m., K.I. Radio Roquete Pinto, Av. Erasmo Braga 118, Rio de Janeiro, Brazilo.
	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (80 kcs), 50.08m, 30.71m, 25.10m, 16.78 m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.

Voĉo de Ameriko. 11.00-11.30 (41.90 m.), 12.00-12.30 (19.72 m.), 22.00-22.30 (31.19 m., 25.22 m.); vidu detalojn en la februara numero, paĝo 30. 1-VII, diskutrodo pri la Usona ekonomia sistemo; 8-VII, diskutrodo pri la Usona eduka sistemo. Raportojn kaj opiniesprimojn oni sendu al D-ro William Solzbacher, Voice of America, Rm. 2528, HEW, Washington 25, Usono.

Radio Roma. 1-VII, Unua jarmilo de la itala lingvo; 5-VII, Tra la literaturo; 8-VII, Leterkesto kaj bibliografio; 12-VII, Novaĵoj el Italujo; 15-VII, Itala belarta urbo Lecco; 19-VII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 22-VII, Mortinta urbo Sibari; 26-VII, Akvofalo de Marmore; 29-VII, Nobel-premio Luigi Pirandello. Krome, ĉiun merkredon, Kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 7-VII, Raportaĵo pri IFEF-kongreso en Helsinko; 15-VII, Memore al A.P. Ĉehov; 21-VII; Pri la famaj jugoslaviaj komponistoj; 28-VII, Respondoj al korespondantoj kaj novaĵoj el la movado; 4-VIII, Bizancaj monaĥejoj en Jugoslavio; 11-VIII kaj 18-VIII, Raportaĵo pri la 45-a U.K. en Bruselo; 25-VIII, Respondoj al korespondantoj kaj novaĵoj el la movado.



KULTURAJ INTERŜANĜOJ

INTER

INFANOJ

Ĉiuj regulaj legantoj de "Esperanto" certe jam scias pri la multaj diversaj aktivoj de UEA kaj de la Esperanto-movado ĝenerale rilate al interŝanĝo de Orientaj Kulturaj Valoroj. Ĝojigas min, ke, kiel unu el la Orientulaj anoj de la Komisiono por tiu laboro, mi havas nun la okazon prezenti al la Esperantistoj simplan, efikan kaj ĝojdonan projekton, kiu samtempe kontribuos al nuna kaj estonta ŝato inter la nacioj kaj per ekkreo de amikecaj sentoj ankaŭ servos rekte al la celoj de la Esperanto-movado.

Koncize mia plano estas, ke infanoj de diversaj Okcidentaj landoj, dividu siajn ludilojn kun infanoj el la Oriento, precipe Hindujo, kie la ideo unue ekestis. Iu Esperantisto kolektu ludilojn aŭ librojn kun akompanantaj leteretoj de kelkcent infanoj de sia lando. Traduku la leterojn en Esperanton kaj sendu la tuton al alia lando.

Siavice tiuj infanoj ankaŭ ricevas ludilojn aŭ librojn reciproke. La donacetoj nepre estu malmultekostaj ĉar la tuta intenco estas la ideo malantaŭ la interŝanĝo kaj la prezento de io tipa de unu kulturo al alia. Eventuale en la kadro de la plano infano el unu lando vizitos la alian (kaj reciproke) kiel juna ambasadoro de amikeco. Tio estas aparte praktika kiam la registaroj subtenas, kiel efektive okazis post la plenumo de la interŝanĝo. La bildo montras, kiel la Usona kultura ataŝeo akceptas donacojn de Hindaj infanoj en la ĉeesto de la subskribinto kaj lia edzino.

Se iu samideano trovas ĉi tiun planon interesa kaj estas preta kunlabori kun mi, li bonvole skribu al mi ĉe "Prerna", Satnagar, NEW DELHI — 5, Hindujo. Ni faru per Esperanto ponton inter Oriento kaj Okcidento.

Veerendra D. Adhiya



Dum la printempa estrarkunsido en Rotterdam!
De maldekstre: Ĝenerala Sekretario, Prof. D-ro I. Lapenna, Red. K. Zacho, Vicprezidanto H. Holmes, S-ro N. Smith, S-ro A. Rajski, D-ro W. Herrmann kaj Prezidanto, Prof. D-ro G. Canuto.



Post streĉa labortago oni iom festas por la gefianĉoj Fighiera. De maldekstre: KKS G. C. Fighiera, Red. K. Zacho, Prez. Prof. D-ro G. Canuto, S-ino B. Zacho, Ĝen. Sekr., Prof. D-ro I. Lapenna kaj F-ino Ada, nun S-ino Fighiera.

CED

Centro de Esploro

kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefona ARNold 90-81

DUA ELDONO DE "LA INTERNACIA LINGVO"

En la jaro 1954 C.E.D. publikigis la verkon LA INTERNACIA LINGVO (Faktoj pri Esperanto), kiu prezentis la ĉefajn atingojn de la Internacia Lingvo ĝis tiu tempo. La verko enhavas abundan materialon, kaj ĝi multe helpis kaj plue helpas al ĉiuj, kiuj deziras havi konkretajn informojn pri la Internacia Lingvo.

Intertempe Esperanto plue disvastiĝis kaj akiris multajn novajn poziciojn. Kiel konate, C.E.D. kolektas dokumentojn pri la afero kaj tiu dokumenta materialo — nun multe pli granda ol en 1954 — estos utiligita por la dua eldono, kiu estos reviziita kaj kompletigita.

Kvankam tre verŝajne la dua eldono ne aperos antaŭ la fino de 1961 aŭ komenciĝo de 1962, tamen C.E.D. jam nun faras la planojn por ĝi. Por ke ĝi estu kiel eble plej bona kun informoj ĝis maksimumo precizaj, C.E.D. petas la helpon de ĉiuj esperantistoj, kiuj povas doni korektajn sciigojn pri kiu ajn ĉapitro aŭ subĉapitro de la libro. En la unua eldono enŝteliĝis pluraj eraroj, kiuj ne estis eviteblaj, se oni konsideras, ke C.E.D. en tiu tempo funkciis nur du jarojn kaj ke la dokumentado pri la Internacia Lingvo estis manka kaj malatentata dum multaj jaroj. C.E.D. deziras doni nun al la Movado kiel eble plej perfektan verkon el ĉiuj vidpunktoj. Tial ĝi esperas, ke la esperantistoj, kiuj posedas precizajn informojn pri kiu ajn ero, donos ilin al C.E.D. kaj indikos ĉiujn detalojn, precipe la fontojn. La nomoj de ĉiuj helpantoj estos menciitaj.

STATISTIKO PRI LA UNIVERSALAJ KONGRESOJ

C.E.D. entreprenis pere de siaj kunlaborantoj du enketojn pri la socia konsisto de la Esperanto-Movado. La unuan faris siatempe s-ro C. J. Keur, la duan s-ino E. Lapenna. La rezultoj de tiuj enketoj estis publikigitaj pli frue.

Nun C.E.D. disponas pri tria studo, kiu ĉifoje rilatas al la konsisto de la Universala Kongreso en Varsovio laŭ profesio kaj aĝo. Ĝin faris la kunlaboranto de C.E.D., s-ro G. C. Fighiera.

La statistiko laŭ profesio rilatas al 2.823 unuaj kongresanoj. La profesioj estas aranĝitaj en 27 grupoj. La socia konsisto de la kongreso konfirmas multilate la rezultojn de la du antaŭaj enketoj. La nombro de laboristoj estis 5.68%. La plej multo de la kongresanoj konsistis el oficistoj (18,73%) kaj instruistoj (11,83%). La nombro de

studentoj kaj mezgradaj lernantoj estas relative tre alta (12,53%). La ĵurnalistoj kaj verkistoj estis proporcie tre multnombraj (2,32%). Minimume 15% de la kongresanoj en Varsovio havis universitatajn titolojn. Inter ili estis 1,34% sciencistoj, 7,40% profesoroj, doktoroj kaj inĝenieroj. La nombro de juristoj estis 1,34%.

La meza aĝo de la kongresanoj estis 42,6 jaroj. La gamo de la aĝo estas same etendita, kiel tiu de la profesioj. Ĝi estis inter 6 jaroj kaj 90 jaroj. Plej multnombraj estis la grupoj inter 20 kaj 25 jaroj (10,36%) kaj inter 25 kaj 30 jaroj (9,20%). Poste sekvas la aliaj grupoj ĝis 65 jaroj. Post la 65-a jaro la procento rapide malgrandiĝas.

Kvankam statistiko pri unu sola kongreso ne povas esti decida, tamen la informoj kolektitaj kaj analizitaj de s-ro G. C. Fighiera estas tre utilaj. Vera bildo pri la profesia kaj aĝa konsisto de la universalaj kongresoj estos ricevita nur kiam estos faritaj enketoj pri 2—3 pliaj universalaj kongresoj. Tute speciale rilate la aĝon la Varsovia kongreso estis iom escepta, ĉar precipe el Pollando kaj aliaj slavaj landoj, en kiuj Esperanto bone disvastiĝas inter la junularo, ĉeestis multaj kongresanoj.

La studo de s-ro Fighiera aperis en la revuo "Associations", aprilo 1960.

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
La stato je la 5-a de marto 1960	43-	6-	3
S-ro J. Beau, Francujo	15-	0	
F-ino Robin, Francujo	12-	0	
F-ino N. Hanson, Britujo	2-	2-	0
S-ro Eizo Ito, Japanujo	5-	0-	0
S-ino D. M. Worcester, Britujo	2-	2-	0
S-ro F. Schneider, Germanujo	3-	9	
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10-	4	
F-ino A. A. Laverman, Nederlando	1-	4-11	
S-ro I. Grahovac, Aŭstralio	7-	7	
S-ro R. Schinkel, Germanujo	8-	6	
S-ro Even Sjoblom, Svedujo	1-14-	5	
S-ro Armand Su, Ĉinujo	3-	10	
Svisa Esperanto-Societo, Svislando	8-	4-	3
S-ro J. Derieuw, Belgujo	1-	2-	9
S-ro B. Honsalve, Hispanujo	11-	11	
Esperanto-Grupo Moyá, Hispanujo	5-	11	
A. Ma-M. Hispanujo	5-	11	
S-ro C. P. Winchcombe, Aŭstralio	14-	8	
S-ro R. S., Britujo	10-	0	
Stato je la 25-a de majo 1960	£ 70-	6-	0

Koran dankon al ĉiuj donacintoj. Specialan dankon al Svisa Esperanto-Societo, kiu ĉiujare donacas al CED konstantan sumon kaj tiamaniere ne nur efektive helpas al la laboro de CED, sed ankaŭ montras aprezon de ĝia agado. En la antaŭaj jaroj pluraj aliaj landaj asocioj agis same, sed en la lasta tempo verŝajne ili forgesis sendi sian donacon. CED laboras por la tuta Esperanto-Movado kaj estus utile kaj bele, se la aliaj landaj asocioj sekvus la ekzempon de la Svisa Esperanto-Societo.

Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ rekte la oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

La Informa Laboro en la jaro 1959

En tiu ĉi numero de "Esperanto" estas publikiĝita la Tabela Trarigardo pri la Informa Laboro en 1959. Por pli bone kompreni la tutan laboron faritan sur la kampo de informado, estas necese atenti la subajn klarigojn.

Ĝenerala komento

Jam plurajn jarojn la Informa Fakto de UEA klopodas organizi la mondan informadon pri la Internacia Lingvo sur kiel eble plej alta nivelo. Tiucele estis senditaj al la landaj asocioj multaj cirkuleroj kun instigoj kaj konsiloj pri la organizo de la landaj informaj faktoj kaj lokaj kunlaborantoj, pri la metodoj kaj kvalito de informado, pri diversaj aspektoj kaj problemoj de tiu laboro. Okazis ankaŭ du gravaj kunvenoj dediĉitaj al la samaj demandoj. La lasta, okazinta en Frostavallen (Svedujo) en aŭgusto de la pasinta jaro, denove pritraktis dum du kunsidoj la tutan problemaron ligitan al informado. Kvankam tiuj klopodoj sendube donis kontentigajn rezultojn, tamen multaj landaj asocioj — kaj ankaŭ unuopuloj laborantaj en tiu branĉo — ĝenerale malatentas la konsilojn, tute speciale la bazajn principojn de informado, kiuj troviĝas en la "Fundamenta Principaro", publikigita denove en la Jarlibro, 1959, Unua parto, pp. 186-190. Tiu principaro ne estas rezulto de spertoj de nur unu persono, sed sekvo de studoj kaj diskutoj inter la plej agemaj kaj plej kompetentaj personoj, pri kiuj disponas la Esperanto-Movado. Se oni vere deziras progresigi la aferon de la Internacia Lingvo, tiam oni devas plej serioze konsideri la menciitajn principojn. Malatenti ilin signifas efektive neglekti la pluan disvastiĝon de la lingvo sur sia teritorio aŭ en sia regiono. Ankaŭ la praktikaj spertoj de la lastaj jaroj klare indikas, ke en tiuj landoj, en kiuj la landaj asocioj formis veran informan fakon kaj komisiis kompetentan personon aŭ komisionon okupiĝi pri ĝi, la rezultoj estas bonegaj kaj la lingvo kontentige disvastiĝas. Male, en la landoj, kie oni ne agis tiel, la Esperanto-Movado aŭ stagnas, aŭ nur tre malrapide antaŭeniras. Tiu fakto — facile konstatebla el la Tabelo mem — estu instigo por absolute ĉiuj landaj asocioj, kiuj ankoraŭ ne formis specialan informan fakon, organizi tian kiel eble plej baldaŭ laŭ "Fundamenta Principaro".

La Tabela Trarigardo estas kunmetita surbaze de informoj, kiujn donis aŭ la informaj faktoj de la landaj asocioj, aŭ la landaj asocioj mem, se ne ekzistas ankoraŭ informa fakto, aŭ iu rekta kunlaboranto de la I. F. de UEA. Bedaŭrinde denove pluraj landaj asocioj ne donis respondon, kvankam la I.F. de UEA plurfoje petis pri tio. El la aliĝintaj landaj asocioj nenian respondon donis la argentina, belga, japana kaj monaka. S-ro Thollet respondis en la nomo de la Maroka Esperanto-

Asocio kaj eksplikis la malfacilaĵojn. El la nealiĝintaj landaj organizaĵoj, nenian vivosignon donis la ĉina, helena, hungarlanda kaj sudazia. Pro tiu neglektado de kelkaj landaj asocioj, la Tabela Trarigardo bedaŭrinde ne estas kompleta. Kiam la gvidantoj de tiuj landaj asocioj komprenos la gravecon de kunlaboro sur tiu ĉi kampo, tiam la ciferoj pri la informado estos pli kompletaj kaj la tuta bildo pri la laboro farita pli realeca.

Rimarkinde bonan laboron faris la brazila, bulgara, dana, itala, jugoslavia, norvega, pollanda kaj sveda informaj faktoj. En tiuj landoj ankaŭ la rezultoj estas elstare bonaj. Estas bedaŭrinde, ke la germana informa fakto, laŭ la sciigo de s-ro Hübner, ne plu ekzistas. Antaŭ nur kelkaj jaroj la informado en Germanujo estis sur alta nivelo. La germana esperantistaro espereble tre baldaŭ trovos solvon por tiu problemo.

La jaro 1959 estis la Zamenhof-Jaro. En multaj landoj la respondecaj organoj de la Esperanto-Movado sciis utiligi tiun fakton ne nur por esprimi omaĝon al la memoro de D-ro Zamenhof, sed ankaŭ por organizi vastan informadon. La rezultoj, kompreneble, estas bonegaj. En aliaj landoj oni apenaŭ ion faris en ligo kun la Zamenhof-Jaro, kvankam la centraj organoj de la Movado donis ankaŭ tiurilate ne nur multajn konsilojn, sed ankaŭ abundajn materialojn, kiujn necesis nur utiligi. Ĉu ne estas malĝojige legi, ke en iuj landoj okazis nur 3 aŭ 4 prelegoj en 1959? Ĉu oni ne povis utiligi la Zamenhof-Jaron por fari dekojn aŭ eĉ centojn da prelegoj pri Zamenhof kaj la Internacia Lingvo en diversaj lokoj, sed tute speciale en la lernejoj? Espereble almenaŭ nun, post la decido de UNESKO pri celebrado de Zamenhof, okazos en la lernejoj multaj prelegoj pri la aŭtoro de la Internacia Lingvo.

Malgraŭ tiuj mankoj, la Tabelo tamen montras progreson kompare kun la pasinta jaro. La sola escepto estas la nombro de artikoloj kaj informoj, kiu konsiderinde malkreskis. Ĉiuj aliaj eroj montras kreskon, kelkaj eĉ tre grandan, kiel klare vidiĝas el la komparaj ciferoj por la jaro 1958 (lasta linio de la Tabelo). Tamen, ankaŭ rilate la nombron de la artikoloj la situacio estas pli bona ol oni povus unuavide supozi. En pluraj landoj oni sukcesis — diference de la jaro 1958 — aperigi artikolojn en la plej gravaj gazetoj de la koncerna lando, kiuj estas presataj en pli granda nombro de ekzempleroj. Krome, laŭ la komentoj ricevita el diversaj landoj, la artikoloj mem estis sur multe pli alta nivelo ĉefe dank' al la fakto, ke temis aŭ pri artikoloj liveritaj de CED, aŭ pri artikoloj verkitaj de la plej kompetentaj enlandaj esperantistoj. Tio faras, ke la gazetara kampanjo nombre restis proksimume la sama kiel en 1958 (prenante en konsideron la tutan eldonkvanton de la gazetoj

TABELA TRARIGARDO PRI LA INFORMA LABORO EN 1959

Landa Asocio aŭ teritorio	Adreso de la Informa Fako aŭ kunlaboranto	Nombro de		Prelegoj		Radio prele- goj	Ekspozicioj		Distrib. afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj	Ĉu la intere- siĝo pri Esp. kreskis?
		arti- koloj	infor- moj	nom- bro	ĉees- tintoj		nom- bro	ĉees- tintoj		
Aŭstralia	S-ino Ruth McGrath, 41 Reynolds Road, Mount Pleasant	28	21	13	550	12	3	100	1.500	kreskis
Aŭstria E. Gazetarservo	S-ro E. Werner, Pilgramg. 9/27 Wien V.	50	20	4	160	—	—	—	1.000	iom kreskis
Belga (Flandra L.)	S-ro Maertens G., Pr. Leopoldstraat 51, Sint Kruis	20	50	3	150	1	1	10.000	5.000	multe kreskis
Brazila	Prof. D-ro Carlos Domingues, Rua Alvaro Alvim, 27, Rio-de Janeiro	1.500	4.000	200	20.000	2.500	12	55.000	45.000	same
Brita	B.E.A., 140 Holland Park Ave. London, W. 11	100	250	100	4.000	4	10	10.000	19.000	kreskis
Bulgara	S-ro N. Nikolov, Šipĉenski prohod 12, Sofia 13	84	74	89	13.000	225	5	5.500	120.000	konstante kreskas
Ĉeĥoslovaka	Sen Fako; informis Ĉeĥoslovaka Esp. Komitato	6	38	1	50	2	1	4.500	—	sama
Dana	S-ro Sven Ziegler, Jølbyvej 9 B, Vanløse	265	500	3	600	4	2	400	10.000	kreskis
Finna	S-ro Vilho Setälä, Esperantotie 4, Matinkylä	105	135	20	5.000	2	2	1.000	6.000	multe kreskis
Franca	Sen Fako; UEF, 34, rue de Chabrol, Paris 10	300	—	270	17.000	62	16	12.000	16.000	kreskis
Germana	Fako malfondiĝis; informis GEA (S-ro Hübner)	250	350	30	300	5	10	300	14.000	stagnas
Hispana	Sen Fako; informis Hispana Esperanto-Feracio, Marqués de Caro, 6, 2a, Valencia	25	80	18	3.000	50	6	4.000	10.000	same
Hinda	Sen Fako; informis la Sekretario de la E grupo, Public Library, New Delhi	10	—	6	1.500	—	1	150	1.000	kreskis
Israela	Sen Fako; informis Esperantista Ligo Israela Kaliŝer 48, Tel-Aviv	30	15	6	200	10	—	—	1.000	kreskis
Islanda	Informis Baldur Ragnarsson, Alfhólsvegur 42 Kópavogur	7	30	—	—	2	—	—	—	iom kreskis
Itala	Informoficejo de IEF, S-ro R. Pennazio, Casella Post. 248, Torino	400	798	117	20.000	81	25	60.000	61.500	ege kreskis
Jugoslavia	IF de JEF, S-ro Marinko Gjiivoje Gornji Trg 31/2 Ljubljana	440	240	30	5.000	90	17	40.000	3.500	tre kreskis
Kanada	IF, S-ro Rüdiger Eichholz, Esperanto-Press, Oakville, Ont.	12	26	3	120	4	2	600	6.000	iom kreskis
Kongo Belga	S-ro Jacques Y. H. Verdier, B. P. 1530, Stanleyville	13	15	2	30	—	—	—	200	tre kreskis

TABELA TRARIGARDO PRI LA INFORMA LABORO EN 1959

Landa Asocio aŭ teritorio	Adreso de la Informa Fako aŭ kunlaboranto	Nombro de		Prelegoj		Radio prele- goj	Ekspozicioj		Distrib. afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj	Ĉu la intere- siĝo pri Esp. kreskis?
		arti- koloj	infor- moj	nom- bro	ĉees- tintoj		nom- bro	ĉees- tintoj		
Meksika	S-ino Alicia Zepeda E. Altamirano 75-1, México, 4, D.F.	30	6	14	190	—	—	—	—	iom kreskis
Nederlanda	Gazetarservo LEEN Zaan- dam P. H. Kade 89	83	221	—	—	—	—	—	200	kreskis
Norvega	S-ro Ludvig Anjer, Oberst Rodes vei 76, Oslo-Nord- strandhøgda	120	596	4	200	1	—	—	5.000	rimarkeble kreskis
Novzelanda	Sen Fako; Novzelanda E. A., P.O. Box 3214, Auckland, CL	97	114	28	1.400	6	15	240.000	22.500	kreskis
Pollanda	S-ro Marek W. Pietrzak, ul. Kamionkowska 39/7, Warsza- wa 26	135	600	48	8.000	26	9	17.000	12.000	tre kreskis
Portugala	Prof. José Bigotte de Almei- da, Rua Astor Vale, 16, 1ºE, Lisboa 1	100	100	5	500	—	3	300	—	iom kreskis
Sveda	S-ro Jan Strönne, 36 Ami- ralsgatan, Malmö	272	698	216	10.000	14	4	190.000	17.000	kreskis
Svisa	S-ro Claude Gacond, Crêt 78, La Sagne, NE	320	—	24	500	3	2	?	3.500	kreskis
Soveta Unio	Informis S-ro Ivan Sergejev, Moskva D-80 Ul. Levitan 1/40-196	400	250	100	12.000	50	80	15.000	20.000	same
Urugvaja	S-ro Rubens A. Barbieri, Río Branco 1556, ap. 606, Monte- video	5	35	4	200	6	3	500	1.100	same
Usona	Sen Fako; informis S-ro Ar- min F. Doneis, P. O. Box 105, Pharr, Texas	40	20	23	3.000	16	13	9.000	40.000	kreskis
Venezuela	Informis S-ro Oscar de Die- go, Apartado del Este 4845, Caracas	60	30	2	100	1	—	—	—	kreskis
31 respondoj	ENTUTE	5.307	9.313	1.383	126.660	3.177	242	675.350	442.000	kreskis
26 respondoj	komparaj ciferoj por la j. 1958	8.284	14.089	1.001	69.920	2.363	238	661.260	308.075	kreskis

kun artikoloj kaj informoj pri Esperanto), dum el kvalita vidpunkto ĝi sendube pliboniĝis.

Pri la unuopaj eroj

Jen kelkaj klarigoj pri la unuopaj kolumnoj de la Tabelo:

Artikoloj: Estas enkalkulitaj ĉiuj artikoloj pri la Internacia Lingvo aŭ pri Zamenhof en la naci-

lingva gazetaro. La nombro de artikoloj malfavoraj al Esperanto estas minimuma. Ekzemple en Brazilo el 1.500 artikoloj nur 2 estis malfavoraj, en Francujo nur 1, en Germanujo nur 3, en Italujo maksimume 2% ktp. En granda nombro da landoj ĉiuj artikoloj estis favoraj. La malfavoraj artikoloj kutime estas iom ŝercaj aŭ mokaj. Ĉe primitivuloj, kompreneble, tio havas efikon, sed tio ankaŭ montras, ke vere serioza kontraŭstaro al

Esperanto praktike ne ekzistas, se oni prenas kiel kriterion de seriozeco argumentadon, aŭ almenaŭ provon de argumentado bazita sur faktoj.

Prelegoj: Temas pri prelegoj pri Esperanto aŭ pri Zamenhof, faritaj nacilingve en kiu ajn medio. La nombro de prelegoj kreskis de 1.001 al 1.383 kaj la nombro de ĉeestintoj preskaŭ duobligiĝis kompare kun 1958.

Radio-prelegoj: Estas enkalkulitaj ĉiuj nacilingvaj prelegoj, intervjuoj kaj pli longaj informoj en naciaj lingvoj pri Esperanto aŭ Zamenhof. Ne estas enkalkulitaj la 1959 radio-elsendoj en Esperanto, sed kompreneble ankaŭ tiuj elsendoj havas unuarangan signifon por la disvastigo de la lingvo.

Ekspozicioj: Iom kreskis la nombro de tiu vere bonega rimedo de informado. Ne estas enkalkulitaj la ekspozicioj en elmontrofenestroj kaj vitrinoj.

Flugfolioj: Tiu kolumno entenas afiŝojn, flugfoliojn, prospektojn kaj similajn propagandilojn.

En pluraj landoj — precipe en tiuj, kie nia informado estas bone organizita — oni aplikis ankaŭ aliajn metodojn. En Aŭstralio oni reklamis en *kinejoj*. Flandra Ligo aranĝis ekspozicietojn en *vitrinoj*. La samon faris pluraj aliaj landaj fakoj, ekzemple la brazila, bulgara (37 vitrinoj kaj 21 konstantaj montrokestoj), jugoslavia, nederlanda. *Televidon* utiligis precipe Brazilo, Britujo, Italujo, Usono kaj Urugvajo. *Cirkulantan ekspozicion* ha-

vas Brazilo. *Gemeliĝon de urboj* praktikis Italujo kaj Jugoslavio. *Glumarkojn* eldonis Danlando, Novzelando kaj aliaj landoj. Pluraj landoj aranĝis *prelegvojaĝojn* de eksterlandaj prelegantoj. Tute certe la prelegoj de f-ino Joŝiko Kaĵino kaj s-ro Eizo Ito en Eŭropo, kaj tiuj de s-ro Tibor Sekelj en Azio, havis tre bonan efikon por la disvastigo de la lingvo. *Kursoj de Esperanto* en nacilingvaj gazetoj; *resumoj aŭ artikoloj* en Esperanto publikigitaj en nacilingvaj revuoj; informoj pri la Esperantaj radio-programoj en *radio-ĵurnaloj*; *nomigo de stratoj aŭ placoj* laŭ nomo de Zamenhof — estas nur kelkaj el la pliaj aspektoj de laboro, kiu kontribuas al la disvastigo de la lingvo.

Informoj pri la agado de la Informa Fakto de UEA en 1959 aperos en la Estrara Raporto, kiun ricevos ĉiu kongresano kaj kiu poste estos presita en la Jarlibro, 1960, Dua parto. Tiu raporto, kune kun la nun publikigitaj detaloj pri la informado en diversaj landoj, indikas, ke UEA kaj la landaj asocioj povas atingi ankoraŭ pli bonajn rezultojn en la sekvantaj jaroj. La informa aparato de la Esperanto-Movado devos ludi speciale gravan rolon en la kampanjo por enkonduko de la lingvo en la lernejojn. Ĝi povos plenumi tiun rolon relative facile, se ĉiuj landaj asocioj kaj kunlaborantoj memdisciplinite kaj rigore observos la principaron de Frostavallen kaj ĉiujn komune akceptitajn decidojn.

I. L.

Ĉina Ĝentileco

En la stacia domo de Tiencin juna vojaĝanto alproksimiĝis al la fervoja estro. Li riverencis elegante por saluti, kaj kun afabla rideto ĝentile ekparolis:

— "Granda posedanto de la feraj ĉevaloj, kiuj galopas sur senfinaj feraj strioj, eligante el si blankan kaj densan vaporon, pardonu, al mi — la ridinda kaj senvalora vojaĝanto, al mi — pli sensignifa ol la sendenta naŭzanta vermo, kiu ruliĝas en la surstrata koto, pardonu al mi — la senrajta sklavo, kiu ne indas eĉ kisi la randon de via kitelo, al mi — kiu dankas sian naskiĝon al ia stranga kaj komika ŝerco de la naturo, pardonu al mi, ĉar mi — simpla kaj memfida aŭdacas malkovri mian malbelan vizaĝon antaŭ vi kaj humile peti: ĉu mi povus adresi etan demandon al vi — ĉion scianta kaj sepoble saĝa?"

La stacia estro stariĝis, riverencis gracie antaŭ la ĝentila vojaĝanto kaj metinte sian manon sur la koron, ĝoje ekparolis:


— "Nobla vojaĝanto, al kies vojaĝelspezoj mi ŝuldas mian rizon — la superbonvolan donacon de via radianta moŝto, mi — forpuŝita petanto de almozo, ne meritanta eĉ superpaŝi la sojlon de via

fabela palaco; nobla vojaĝanto, vi, kiu aperas antaŭ mi kvazaŭ radio de la brilanta suno, mi ĵetas min antaŭ viajn piedojn, mi etendas miajn malbelajn brakojn supren al Dio kaj petas vin: bonvolu adresi al mi vian ŝatatan demandon kaj se mi povus respondi al vi laŭ nedisputebla kaj nerefutebla maniero, mi konvinkiĝos, ke mia praavo, mia avo, mia patro kaj mi ne vane naskiĝis kaj vivis sur la tero!"

— "Granda reganto de la feraj ĉevaloj" — rekomencis la vojaĝanto, "la demando, kiun mi aŭdace adresas al vi, estas la jena: je kiu horo forveturas la vagonaro al Pekin?"

— "Nobla vojaĝanto! Vi faras min feliĉa! Vi verŝas novan riĉan enhavon en mian animon! Vi renovigas mian ekzistadon, farante ĝin celplena! Mi povas respondi al via modesta demando, falanta kvazaŭ miela guto el la lipoj de via honorata kaj radianta moŝto. Nobla vojaĝanto! La vagonaro al Pekin forveturis antaŭ dek sekundoj."

El germana lingvo tradukis:
Kiril Kraĵev, Sofia



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Ivo Osibov
Tuŝkanova 21/III, Zagreb, Jugoslavio

La kvinan fojon sur Feldberg:

MIGRADO MIA KORPLEZUR'

Kontraŭ forta vento kaj tra densa nebulo grupo da junaj geesperantistoj migris sur la neĝokovrita deklivo de la 1500 metrojn alta Feldberg al la Todtnauer Hütte. Tiu ekspedicio okazis ne en la pasinta vintro, sed paskodimanĉon, la 17-an de aprilo, do en la laŭkalendara printempo. "Aprilo faras kion ĝi volas", diras proverbo, kaj la veterdio plibeligis la ĉi-jarajn pas-kajn festotagojn per pluvado en la valoj kaj per neĝado sur la montoj. Sed tio ne ĝenis niajn migremulojn. Ili varmigis sin survoje per neĝbulaj bataletoj, dum kiuj la knabinoj montris sin tre afablaj, kaj en la kabano per regalo de kafo, kakao, teo, brando kaj per gaja kantado.

La 5-an Internacian Junularan Kunvenon sur Feldberg oni povas nomi la renkontiĝo de la kantoj, ĉar neniam antaŭe sonis tiom da Esperanto-kantoj en kaj ekster la junulara gastejo Hebelhof, kie de la 14-a ĝis la 18-a de aprilo loĝis tri dekduoj da geamikoj el dek ses urboj en Belgujo, Francujo kaj Germanujo.

Pro diversaj malhelpaĵoj la anoncitaj delegacioj de la Studenta Esperanto-Klubo en Beograd kaj de la Junulara Esperanto Rondeto en Budapeŝt bedaŭrinde ne povis veturi en la Nigran Arbaron. Tamen la Jugoslaviaj gestudentoj almenaŭ parole partoprenis per tre bona sonbenda programo, ĉe kies fino ili invitis kvin ĉi-jarajn Feldberg-anojn al senkosta restado dum la III-a Kultura Festivalo de Jugoslaviaj Esperantistoj en Split.

Dum la malferma kunsido la 14-an de Aprilo Richard Reuchlin, la gvi-

danto de la kunveno, memorigis siajn junajn geamikojn pri la mortotago de D-ro Zamenhof. Grandan aplaŭdon ricevis la kartosalutoj de Kho Kwatliat el la fora Djakarta en Indonezio.

Same kiel en la pasintaj jaroj venis ankaŭ ĉi-foje multnombra grupo el Tailfingen, la konata esperantista urbeto sur la Svaba Juraso. La 10-jaraj ĝis 13-jaraj diligentaj gelernantoj de "paĉjo" Woldemar von der Ley prezentis sin lertaj geaktoroj: Kun siaj iom pli aĝaj samgrupanoj ili ĝojigis la aliajn ĉeestantojn per humoraj, pri-pensindaj poemoj kaj skeĉoj. Rekom-pencante ilian fervoron la "Paska leporo" donacis al ĉiuj pecon da ĉokolado.

Krom al Todtnauer Hütte la internacia popoleto ekskursis al la Feldberg-pinto, al Feldsee kaj al Herzogenhorn, kiu kun siaj 1417 metroj estas la dua plej alta monto de la Nigra Arbaro.

Dum la vesperoj Rudi Hauger (Saarbrücken), Bernhard Koch (Radolfzell) kaj Johannes Radam (Mannheim) montris belajn kolorlumbildojn pri la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, la 4-a Feldberg-kunveno kaj esperantistaj renkontiĝoj apud la Lago de Konstanco.

Plezure la infanoj disdonis grandan kvanton da diversaj flugfolioj al la multaj aliaj junaj gastoj en Hebelhof, kies gemastroj, gesinjoroj Schef-fold, estas dankindaj pro la kiel ĉiam tre afabla gastigado.

Ĝis revido venontan paskon dum la 6-a Internacia Junulara Kunveno de la Germana Esperanto-Junularo sur Feldberg!

Richard Reuchlin

DENOVE ESPERANTISTA LABORBRIGADO EN JUGOSLAVIO

Dum la 3-a Kultura Festivalo en Split kunsidis la Administra Komitato de la Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio. Ĝi pridiskutis realigon de la laborplano kaj organizajn problemojn. La ĉefa temo estis organizo de laborbrigado.

Laŭ permeso de la Ĉefa Stabo de la junularaj laborbrigadoj en Jugoslavio ĉi-somere laboros la 2-a Esperantista Junulara Laborbrigado. Ĝin konsistigos 120 junaj geesperantistoj el la tuta lando. La brigado partoprenos en la konstruado de la moderna aŭtoŝoseo "Frateco kaj Unueco" kiu kunligas la nordokcidentan limon kun la sudorien-

ta tuŝante kvin el la ses respublikoj de Jugoslavio. Pli grandan parton de la ŝoseo junularaj brigadoj jam fin-konstruis dum pasintaj jaroj. La esperantistaj junuloj, kiuj laboros en la ĉi-jara 2-a EJLB jam havas sperton de la unua brigado, kiun ili organizis en la jaro 1958 kun granda sukceso.

La libera tempo en la brigado estos bone utiligita, ĉar krom diversaj kulturaj aranĝoj komunaj al ĉiuj brigadoj, oni organizos seminariojn kaj prelegojn, kiuj helpas al la brigadanoj fariĝi lertaj junularaj gvidantoj en la societoj post la reveno hejmen.

IMPONA KULTURA FESTIVALO

Dum la Unuamajaj festotagoj en la urba teatro en Split okazis la 3-a Kultura Festivalo de Jugoslaviaj Esperantistoj. Laŭ vizito kaj partopreno oni povas nomi ĝin internacia. Inter pli ol 900 personoj el 45 jugoslaviaj lokoj ĉeestis ankaŭ grupoj kaj unuopaj geesperantistoj el Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Danlando, Germanujo, Italujo kaj Polujo. Dum la malfermo la Festivalon salutis en Esperanto D-ro Branimir Gabriĉević nome de la Konsilantaro por Kulturo de la Popola Respubliko Kroatujo kaj nome de la Urba Komitato.



Grandan impreson faris pli ol 400 infanoj kaj gejunuloj, kiuj dum du tagoj (antaŭtagmeze, posttagmeze kaj vespere) revuis sur la scenejo kun siaj altkvalitaj programeroj dramaj, folkloraj, baletaj, sol- kaj ĥorkantaj kaj aliaj. Menciinde estas, ke plimulto el ili lernas Esperanton en la lernejoj. Krome la distran programon dum la Interkona Vespero partoprenis ges-roj el Vieno H. Reiter kaj H. Thuman. La Bulgara Esperanto-Teatro konsistanta el 20 profesiaj geaktoroj lerte prezentis la tutvesperan komedion de I. Vazov "Ĉasantoj de Oficoj".

La partoprenantoj vizitis la antikvan parton de la urbo kaj la proksiman mezepokan urbeton Trogir sub gvidado de fakaj gvidistoj-esperantistoj.

La Festivalo pruvis aktivan partoprenon de la esperantistaro en la kultura vivo de la lando, ĝi montris altan kvaliton, amasecon kaj seriozecon de la movado. Tial la gazetaro kaj la radio-stacioj antaŭ, dum kaj post la Festivalo abunde raportis pri ĝi. I.O.

DANLANDO

La dana financministerio aprobis Centra'n Dana'n Esperantista'n Ligo'n kiel asocion, kiu rajtas ricevi mondonacojn kun tiu sekvo, ke la donacintoj rajtas subtrahi la donacon en la impostdeklaro.

La decido ne nur havas grandan ekonomian signifon por CDEL, sed ankaŭ grandan moralan gajnon por la danaj esperantistoj, ĉar nur bonfaraj kaj ĝenerale utilaj asocioj povas ricevi tiun aprobon. La kondiĉoj por ricevi la aprobon cetere estas sufiĉe severaj.




16-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

Post kelkaj semajnoj malfermiĝos en Rotterdam la 16-a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O.

Dum unu semajno gejunuloj el pluraj landoj havos la okazon ŝin amuzi en agrabla internacia sfero. La aliĝintoj jam estas ricevintaj la ĝeneralan programon, per kio ili sciigis ke ilin atendas ŝip- kaj aŭtobusekskursoj, prelegoj de konataj kaj valoraj esperantistoj (Prof. I. Lapenna kaj D-ro P. Neergaard), vizito al Internacia Ekspozicio "Floriade", distraj vesperoj. Krom tio okazos ankaŭ kongresa balo kaj vizito al "Konstrucentro".

Tiu ĉi estas daŭra ekspozicio pri ĉio rilate domkonstruadon kaj dekoracion, la plej ampleksa tiaspeca en Eŭropo. Ĝuste en tiu ĉi jaro okazos aparta ekspozicio nomata "Spaco por la junularo". Pro ĝia karaktero la Loka Kongresa Komitato opiniis ĝin tre taŭga por ĝin envicigi en la programon de la 16-a I.J.K.



"Bouwcentrum" (Konstrucentro)

Kiel anoncote, la disponeblaj lokoj en la kongresejo estas limigitaj. Tamen, por ebligi al kiel eble plej multe da gejunuloj partopreni la kongreson, L.K.K. sukcesis havigi al si pliajn dormlokojn. Sekve nun ankoraŭ estas ebleco por akcepti aliĝojn.

Vian aliĝilon kaj la kotizon sendu tuj al la peranto en via lando aŭ rekte al: 16-a Internacia Junulara Kongreso de T.E.J.O., Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando, Pĉk. No. 27.54.61.

Novaj Libro

Duope ricevatajn ni recenzas; unuope ricevatajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

WINDOW ON NEPAL, originale verkita en Esperanto de Tibor Sekelj, tradukita de Marjorie Boulton en la anglan lingvon. Eldonita de Robert Hale Limited, 63 Old Brompton Road A.W. 7, London.

MODERN BOYS ANNUAL* estas angla libro por knaboj, redaktita de Robert Campion. Inter la multaj interesaj artikoloj troviĝas bildserio pri la vivo de D-ro L. L. Zamenhof — tre bone ilustrita. Tiu bildserio ampleksas 8 paĝojn kaj estas havebla ĉe la Brita Esperantista Asocio. Prezo de la bildserio: -,30 gld., 1,20 steloj.

DEINE ZWEITE SPRACHE de Arthur Baur — libreto enhavanta 32 paĝojn en la germana lingvo pri la Internacia Lingvo. Eldonejo: Schweizerisches Jugendschriftenwerk.

DE PARIZO AL LAZURA MARBORDO* de M. Rétot. Turismaj informoj per Esperanto en flava vojaĝmapo. 30 paĝoj. Prezo: 1,25 gld., 5 steloj.

ESPERANTO-PAROLATA* de M. Rétot. Adresaro por internaciaj vojaĝantoj. 24 paĝoj. Prezo: 1,20 gld., 4,80 steloj.

AUGALU GYVENIMAS, originale en Esperanto "La vivo de la plantoj" de Paul Neergaard. La libron tradukis Prof. J. Dagys litvalingven.

LUMMELUNDA — GROTTORNA, geologia priskribo de Leander Tell en la lingvoj angla, franca, germana kaj Esperanto. Eldonejo Centrocommerce AB, Norrköping. 32 paĝoj. Prezo: svedaj kronoj 1,90.

JUGU MEM, faktoj pri Ĉeĥoslovakio, eldonita de Orbis. Enhavas ĉiastecajn informojn pri Ĉeĥoslovakio. 84 paĝoj. Prezo: Kĉs 2,80.

KIU ESTAS PATRO PIO?* Aŭtoro Alberto del Fante, tradukita de Frato Atni F. C. Eldonita de La Fratoj de la Karitato S-akta Kamilo, Inst. Bierbeek, Belgujo. Prezo: 2,00 gld., 8 steloj.

VEGETARANO, organo de T.E.V.A. Nova serio de tiu revuo komenciĝis. Eldonanto: Jehezkel Dorn, Vegetara Kolonio Amirim, Merom HaGalil, Israelo.

VORSCHAU, ELMSHORN, monata revuo germanlingva, ĉiam aperigas informojn pri Esperanto.

BROŝUROJN ELDONIS :

POLA RADIO, Varsovio, Pollando, okaze de sia 15-jara jubileo. Informoj pri la pola radio kaj ĝia laboro en Esperanto. La broŝuro estas havebla senpage.

BRUXELLES, belaj ilustraĵoj de la kongresurbo 1960. La broŝuro estas havebla ĉe: Centre d'Information de Bruxelles, 10, Rue du Chêne, Bruxelles.

MEMUARO PRI GEOGRAFIAJ NOMOJ, prezentita al la 44-a U.K. de Esperanto en Varsovio, la 4-an de aŭgusto 1959 de AVOTO (kongresn-ro 1935). Prezo: 1 ŝil. angla aŭ 2 rpk. Havebla ĉe la aŭtoro: BM/Avoto, London, W.C. 1.

ANDREO CSEH 50 JAROJN ESPERANTISTO

CSEH-METODO 40-JARA

La Internacia Esperanto-Instituto 30-jara

Antaŭ kvindek jaroj Andreo Cseh, dekkvinjara, hungardevena, fariĝis esperantisto. Nurajn dek jarojn poste, en 1920, li ellaboris sian faman kursmetodon, kiu de tiam triumfe trairis la mondon, konkeris publikojn, konvertis amasojn, ĉie kie li aŭdigis ĝin. Ankoraŭ dek jarojn poste li fondis kun Ges. Isbrucker la Internacian Cseh-Instituton — poste Internacia Esperanto-Instituto — kaj edukis stabon de eminentaj instruistoj, kiuj ĉie instruis laŭ lia metodo. La milito disrompis ĉi tiun epokfaran laboron, poste pene kaj nur parte rekonstruitan. Andreo Cseh ne plu gvidas kursojn mem, sed en ĉiuj anguloj de la mondo oni instruas laŭ lia metodo kaj en la lastaj jaroj li denove gvidas seminariojn por eduki instruistojn, kunlige kun la Universalaj Kongresoj. Plue, li daŭre redaktas la gazeton *La Praktiko*, kiun li fondis en 1932.

Ne estas la intenco doni en tiu ĉi momento seriozan biografion pri la homo, kiu donis al la Movado unikan rimedon por popularigi la lingvon Esperanto. Ni deziras nur atentigi pri la supraj faktoj, por ke neniue preterlasu la okazon en Bruselo vidi, aŭdi kaj gratuli ĉi tiun modestan homon, kiun tuŝis la fajrero de genieco.

Belartaj Konkursoj 1959

B r a n ĉ o: Originala prozo

Tria Premio

NENIAM PLU!

Iun dimanĉon, por ne ĝeni mian edzinon dum la kuirado de la tagmanĝo, mi prenis mian okjaran filineton je la mano kaj kondukis ŝin al la apuda parko. La varmaj majaj sunradioj allogis tien multajn infanojn kaj la bruo estis granda. Sur la benkoj kunpremiĝis zorgemaj gepatroj kaj geavoj, priatentante — kvazaŭ gardaĝeloj — la kuradon kaj saltadon de la etuloj. Baldaŭ mia filino enmiksiĝis inter infangrupon, absorbitan en ludo, kies celo estis per unupieda saltado enpuŝi ŝtoneton en apartan kvadraton, kiun oni nomas "ĉielo".

Mi ĉirkaŭrigardis inter la benkoj kaj, malkovrinte hazarde kelkcentimetran liberan lokon, sidiĝis. Maldekstre de mi tronis energia patrino, supersutante sian etulon per lavango da malpermesoj. Dekstre sidis pli aĝa virino, laŭaspekte pensiulino, kaj legis ian libron.

Subite mi aŭdis infankriojn, kvereladon, kaj iom poste alkuris mia filino kun larmolavita vizaĝo:

"Paĉjo, mi venkis.... mi estus devinta eniri la ĉielon, sed la aliaj diras, ke tio ne estas vero.... ke mi trompis ilin.... Mi ne trompis ilin, paĉjo, mi ne trompis ilin.... Mi volas iri en la ĉielon....!"

"Nu, ne gravas, Manjo.... Lasu ilin! Ludu kun aliaj infanoj", mi provis haltigi la torenton de ŝiaj lamentoj.

"Mi venkis kaj mi volas iri en la ĉielon.... paĉjo, mi volas...."

Ŝajnas, ke la obstina plorado de mia filino tuŝis la pensiulinon ĉar ŝi fermis sian libron kaj alparolis Manjon:

"Knabineto, ĉu vi deziras, ke mi ion rakontu al vi?.... Ion pri alia knabineto, kiu — same kiel vi — nepre volis iri en la ĉielon?"

Tiuj ĉi vortoj ŝajne surprizis Manjon, ĉar ŝi ĉesis plori kaj turniĝis al la virino, kiu ŝin rigardis kun stranga rideto, altrudita al la laca, pala vizaĝo.

"Nu, ĉu vi volas?"

"Jes", snufetis mia filino.

La virino metis sian libron sur la benkon, fiksas la rigardon ien en la malproksimon kaj komencis rakonti:

"Estis festotago. En la kalendaro ja nigris "mardo", tute simpla "mardo", sed tamen estis festotago. Jes! De kie mi tion scias? Ho, heroldis ĝin rozkoloraj hiacintoj. Ili trumpetanoncis la alvenon de Tonjo.

Tonjo estis malgranda knabino, ne multe pli juna ol vi, sed ne tiel sana. Ŝi havis piedodifekton: ŝi lamis. Ŝi ne povis salti kaj kuri en la parko. Ŝi ne povis ludi kun la ceteraj infanoj. Multajn, multajn monatojn ŝi pasigis en la malsanulejo kaj hejme, en la lito.

Do, tiu tago, pri kiu mi rakontas, estis grava — almenaŭ por ŝiaj floroj en la ĝardeno! Tonjo ne vizitis sian ĝardenon dum ok tagoj. Ok tagojn la floroj ne vidis ŝin — kaj tio estas multe por la floroj, ĉar ili vivas tre mallonge. Cezaro, la gardisto de Tonjo, jam frumatene alportis al ili la sciigon."

"Kaj kiu estis Cezaro?"

"Cezaro estis hundo, granda hundo — ŝia fidela gardisto. Do, tio okazis en domo, kiu staris tute ĉe la komenco de larĝa strato. Ĝi estis dika, maljuna, kaj apogis siajn ŝultrojn sur fostojn por ne fali teren. Tiel ĝi similis al la kaduka najbarino de Tonjo, kiu ŝin ofte vizitis kaj havis belan nigran bastonon kun arĝenta tenilo. Sed, la domo bezonis ne unu, sed kvin apogilojn — ĝi ja estis kvinoble pli maljuna ol la najbarino. Kaj la teniloj ne estis arĝentaj, sed simplaj, lignaj, tramorditaj de vermoj.

Ĝi — la domo — klinis iomete la kapon por pli facile priaŭskulti la babiladon de la floroj en la apuda kortoĝardeneto. Ĉar vi devas scii, ke ĝi estis scivolema kiel ĉiuj maljunulinoj. Ĝi eĉ ne rimarkis, ke ĝia noktoĉapo iom glitis sur la frunton — tiel profunde ĝi aŭskultadis kaj observadis. Se mi jam parolas pri ĝi, mi menciuj ankaŭ tion, ke ĝi portis tage-nokte la saman noktoĉapon, kiu de la longa uzado iĝis nigra-verda, kvankam ĝi iam estis helruĝa. Nu, tion pri la ĉapo.

Dikaj ŝvitgutoj ruliĝis de la domfrunto sur la ĝardenon. Iu saĝulo ja povus diri, ke la gutoj estis restaĵoj de la matena pluvo, sed kredu, ke ili estis ŝvitgutoj. Jes, ŝvitgutoj, ĉar — se vi rememoras — mi diris, ke la domo estis dika kaj maljuna, kaj krome ĝi devis porti surfrunte la pezan noktoĉapon. Ankaŭ vi ŝvitus en tia okazo, ĉu ne?"

"Jes", konfesis Manjo.

"Sed nin ja ankaŭ interesas kio okazis en la florĝardeno", daŭrigis la virino. "Ho, tion vi estus devinta vidi! Tie troviĝis multaj ĝardenloĝantoj — simplaj kaj eminentaj. Meze pompis la rozo sur trono. Ĝi flamis ruĝete kaj portis etan diamantan kronon surkape. Simplaj homoj dirus: akvoperlojn, sed estu certa, ili estis veraj diamantoj — ne decus ja al reĝino porti falsaĵon — kaj vi scias, ke ĝi estas reĝino, reĝino de ĉiuj floroj. Ĝi silentis memfide kaj majeste, kvankam ĝia kortego babilis ekscitite.

La tulipoj estis freŝpoluritaj — kiel la botoj de bonedukitaj infanoj. Rigidmiene ili levis la malplenan kapon — kiel veraj ministroj.... Ho, mi forgesis diri, ke ili estis la potencaj ministroj de la rozkortego.

Papavfloro, simpla kamparano, enŝovis sian

kapon tra truo de la reĝkorta barilo kaj ruĝiĝis pro la nedemokrata sinteno de la tulipoj.

La diafanaj lilioj tenis flagfoliojn solene — kiel ja decas al kortegfraŭlinoj. Ili surhavis robojn blankajn, freŝlavitajn de la matenpluvo. La impertinentaj papilioj klaĉis, ke tute profunde, en la koro, la lilioj kaŝas ruĝetajn kaj violajn makuletojn — sed ne kredu tion! Ili estis tute blankaj. La papilioj ĉien enŝovas sian nazon kaj ŝajnigas ĉion plej bone scii en la mondo.

En respektoplena distanco, laŭ la ĝardenbarilo, viciĝis sunfloroj — la reĝingardistoj. Ili plumblovis sin por fariĝi almenaŭ tiel grandaj, kiel la suno, ĉar tion ja postulis ilia nomo.

Kaj multaj, multaj aliaj festvestitaj korteganoj kaj popolanoj staris atende.”

”Kaj kie estis Tonjo?” demandis mia filineto.

”Paciencon, pasiencon... nun mi parolos pri ŝi. Do, ĉiuj staris atende — kiel mi diris — kaj tiam subite:

KLAK — ŝrrr....

KLAK — ŝrrr....

La blua memorfloreto traŝovis sian kapeton el inter la longaj kruroj de la sunfloroj.

KLAK — ŝrrr....

Knabino, kvinjara, en blanka festorobo, delikata — kvazaŭ ŝi estus el vualaj punktoj kaj lunradioj — penŝovis sin antaŭen. Granda, malluma okulparo bluis sur pala vizaĝo.

Paŝon post paŝo ripetiĝis la samaj movoj: la maldekstra maneto direktis fortostreĉe la lambastonon antaŭen, posttreniĝis la maldekstra kruro, peza de la nova gipsovolvaĵo, kaj rapide ĝin sekvis la dekstra kruro.

La knabinon sekvis homokula hundo, ŝtelatentante — laŭ la devo de bona gardisto — ĉiun ŝian movon.”

”Cezaro, ĉu ne?” rimarkigis mia filino.

”Jes, vi divenis. Tio estis Cezaro.

Tonjo ravite haltis apud la unua fosto. Ŝi pikis la bastonon en la teron kaj dekstrabraĥe ĉirkaŭpremis la tegmentapogilon. Laodoro de la ĝardenloĝantoj bonvenigis ŝin. La floroj ekkantis la plej belajn melodiojn. Jen eksonis tono blua kaj blanka, jen flava kaj ruĝa. La fajrolilio taktbalancis laŭ la spiro de venteto siajn longajn foliojn. La eta akvilegio tintis. Ekgenuis la violoj de la pia sento, kvazaŭ infanetoj en preĝejo.

Jes, estis belege. Tonjo amis la florojn. Ili neniam vokis ŝin ”lamulino” kiel faras la homoj. Ili preferis silenti, ol elparoli tiel aĉan vorton.

La korpeto de Tonjo frostotremis. Sed alvenis la suno kaj kisis ŝiajn vangojn; kaj por ke ne estu tro varme, ludis zefiro kun ŝiaj blondaj bukloj. Ĉarma bunta papilio petole ĉirkaŭflirtis ŝian blue-palan nazeton.

Blankaj, rondaj nubetoj rulruliĝis laŭ la sunradioj suben, rekte en malgrandan flakon, kiun la suno forgesis forviŝi post la matena pluvaĉo. Forgesis, aŭ intence lasis — kiu scias? Unu nubeto

postglitis la alian kaj kunportis eĉeron de la ĉielo.

Tonjo spirretene observis la flakon. ”Tio ja estas la ĉielo mem”, ŝi pensis. Ho, kiel forte ŝi sopiris ekde sia unua konscia korbato la ĉielon. De la ofta kaj longa rigardado ĉielen ŝiaj okuloj jam akiris la ĉielkoloron. Sed kiel levi sin tiel alten, tiel malproksimen? Eĉ la sonĝoŝtuparo de la biblia Jakobo ne helpus ŝin. Ĉiu ja bone scias, ke per aĉa lambastono oni povas atingi eĉ ne la unuan etaĝon de kokejo.

Sed nun la ĉielo estis tute proksime, apud ŝiaj piedoj kaj bastono — malfermita, facile atingebla. Nur glito malsupren — kaj ŝi estos meze de ĝi. Absorbe ŝi rigardis kaj ekrevis vive pri la feliĉo, kiu ŝin atendas tie en la ĉielo.

Intertempe en la flaketo multis kaj tumultis la nuboj. Estiĝis rulsona bruego: ili kuris, ruliĝis, saltis unu sur la alian. Ĉiu volis esti la superulo. Ili parolis la ĉiellingvon, sed kun iom stranga akcento de la nubdialekto.”

”Kaj ĉu Tonjo komprenis ilin?”

”Nu, knabino mia, neniu povas postuli, ke etulinokomprenu la ĉiellingvon — sed Tonjo tamen komprenis ĝin, kvazaŭ ŝi estus indiĝeno de la ĉielo. Ŝi ĝin ellernis de la ofta observado.

En la nublukto fine venkis dikventra blankulo. Gaje ĝi ektronis sur la dorso de la venkitoj kaj ektamburis sur sia ventro. Senkapa ĝi estis — al la potenca moŝtulo sufiĉis la dikega ventro. De forta tamburado fine ĝi krevis. Kaj kion povis Tonjo vidi de ĝia interno? Imagu: nenion. Nenion ĝi havis en si.

La malpleniĝintan lokon tuj ekkaptis alia tronaspiranto. Ĝi turnadis sin en diversajn monddirektojn por montri al eventuale ĉeestantaj fotistoj sian plej moŝtan flankon. Ĝi violonis longtone sur sunkordoj pri sia bonkoreco kaj justeco — kaj komforte ĝi eknestis sur la ĝiba dorso de la subuloj. Post mallonga tempo forpuŝis ĝin la tria kaj pufigis la jam sufiĉe dikajn vangojn. Ĝi lerte buŝharmonikis sur herbofolio.”

”Ho, tion ankaŭ mi kutimas fari!” ekkriis ĝoje Manjo kaj klakis per la manoj.

”Ĉu ne? Kaj tiam la najbaroj fermas la fenestrojn pro la akraj fajftonoj...”

”Jes, ankaŭ mia panjo kutimas koleri”, diris mia filineto honteme kaj observis min, kion mi diros, sed mi restis muta.

”Do, mi ne scias pro kio”, daŭrigis la virino, ”eble pro sia lerteco, sed la tria nubotenis sin supre plej longe. Ĉar lerte ĝi muzikis — tion mi jam diris. Laŭ bloveto de venteto ĝi saltis jen orienten, jen okcidenten. Kaj ĝi alvenigis ankaŭ orgentretantojn, kiuj diligente tretis kaj knedis la tutan gregon suben. Pro la raviteco pri ĝia muziktalento, la plej etaj, plej malsupraj nuboj faris transkapiĝan salton. Al neblinduloj ja tuj estis okulvidebla ilia esenco: ili estis senkoloraj, senenhavaj. Estas vero, ke ili iam-tiam brilis jen blanke,

jen blue, jen ruĝe, sed ĉio tio estis nur la rebrilo de aliaj ĉielaj estaĵoj.

Cezaro alokulis sian Tonjon. Ĝi ne agnoskis la ĉielon — ian ajn ĉielon. Pro tio ĝi ne komprenis, kion oni povus admiri en simpla akvaĉo. Por la propra amuzo, li ekglitis sur sia postaĵo, kun levitaj malantaŭaj piedoj. Poste ĝi rememoris, ke iam estis sur tiu sama postaĵo alligita bela vosto kaj ĝi komencis ĝin serĉi, rondturnigante freneze.

"Ha, ha, sa....", ridtrilis Manjo. "Ĉu ĝi trovis ĝin, la stultulo?"

"Jes, kompreneble, sed ne ofendu ĝin, ĉar ĝi estis inteligenta hundo, nur iom petolema kaj ŝercema. Vi vidas, ke la vostafero kaj glitado estis por Cezaro pli grava kaj amuza, ol la ĉielmuziko. Ne forgesu, ke ĝi estis tamen hundo kaj ne homo, kaj — krome dirite — ĝi fieris pri tio!

Sed por Tonjo la prezentado estis mirinde bela. Kaj ŝi ekdeziris la ĉielon eĉ pli forte. Jes, nun ŝi sciis, kion ŝi faros: ŝi iros al la ĉielo. La pezajn gipson kaj lambastonon ŝi lasos surtere. Tiujn aĉaĵojn ŝi ne bezonos tie.

Jen, pli forte ekbruis la komika muziko. Ŝi ne povis sin deteni kaj gaje ekplaŭdis per la manetoj.

La akvo ekŝprucis alten, ĝis la noktoĉapo de la domo. La flako kotkraĉis ĉirkaŭen."

"Ve, ŝi falis!" konstatis mia filino kaj la rideto glaciigis sur ŝia vizaĝo.

"Abrupte ĉesis la ĉielmuziko", daŭrigis la virino. "Malheliĝis la diamanta krono de la rozo, kiu pro la honto klinis sian reĝinan kapon. La akvilegio tintis alarmon. La memorfloreto blindiĝis de kotguto, eksidinta ĝuste en la mezo de ĝia flaveta okulo. Ankaŭ la aliaj floroj deturnis la rigardon por ne vidi la malgajan scenon. Cezaro bojis, bojegis."

„Kaj tiam?"

La virino paŭzis iomete.

"La patrino aŭdis la bruon:

— Tonjo, Tonjo — ŝi vokis el la kuirejo.

Ŝi alkuris kaj levis sian malfeliĉan infanon.

— Jen, mi vin avertis, ke la tero estas glita — ŝi diris.

La patrino trempis la etulinon en grandan akvobarelon. La blanka festorobo kuŝis en angulo — tute nefeste. Ĝia ankoraŭ antaŭ nelonge blua rubando estis deŝirita.

— Jen koto en viaj oreloj, en la nazeto, ĉie — riproĉis milde la patrino.

La iam krispaj haroj de la knabino algluiĝis kiel kasko al ŝia kapeto.

La patrino lavis sian infanon per akvo kaj per larmoj. Ŝi envolvis Tonjon en sian grandan antaŭtukon, klinis la zorgplugitan frunton sur ŝian kape-ton kaj ordigis la malsekajn buklojn. En la okuloj de patrino ankoraŭ pendis larmoj. En tiuj larmoj rebrilis la milforma malĝojo de lamulinpatrino.

— Tonjo, Tonjo, kial vi timigas vian panjon? — demandis la patrino.

Kaj plortremis la voĉo de la etulino:

— Panjo!

— Jes, karulino?

— Panjo.... neniam plu mi deziros iri al la ĉielo! Neniam plu!"

La virino ĉesis paroli. Malaperis de sur ŝiaj lipoj la stranga rideto kaj en tiu momento ŝajnis al mi, ke ŝi maljuniĝis ankoraŭ kelkajn jarojn.

"Povra knabineto", komentis malgaje mia filino.

La virino respondis nenion. La anguloj de ŝiaj maldikaj lipoj amare oblikviĝis kaj ŝi bruske deturnis la rigardon. Post momenta hezito ŝi ekstaris, prenis la libron, eltiris de sub la benko lambastonon — kiun mi rimarkis apenaŭ tiam — kaj malrapide forbalanciĝis:

KLAK — ŝrrr....

KLAK — ŝrrr....

Post du-tri minutoj ŝi malaperis inter la arboj.

Mi restis konsternita. Mi emis postkuri ŝin, konsoli ŝin, diri al ŝi almenaŭ unu belan vorton — sed io min retenis. Rekonsciigis min la obtuza voĉo de mia filineto:

"Paĉjo, ni iru hejmen. Por hodiaŭ sufiĉas la ludado.... mi estas laca!...."

Antonija Albert

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1960									
Stato je la 31-a de majo									
Konkurso I									
	Lando	Kvoto	Poentoj	%		Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	2470	2770	112.15	14.	Norvegujo	2035	1330	65.36
2.	Belgujo	1985	2046	103.07	15.	Jugoslavio	7155	3160	44.16
3.	Nederlando	5093	5241	102.91	16.	Brazilo	8260	2931	35.48
4.	Britujo	6565	6345	96.65	Konkurso II				
5.	Francujo	7111	6700	94.22	1.	Aŭstrujo	1425	1510	105.96
6.	Svislando	2075	1895	91.33	2.	Aŭstralio	1076	1071	99.54
7.	Finnlando	2515	2280	90.66	3.	Israelo	250	240	96.—
8.	Usono	3430	3055	89.07	4.	Kanado	615	570	92.68
9.	Svedujo	6605	5815	88.04	5.	Sudafriko	250	230	92.—
10.	Hispanujo	2837	2395	84.42	6.	Urugvajo	255	220	86.27
11.	Italujo	4469	3600	80.55	7.	Portugalujo	575	475	82.61
12.	Germanujo	7450	5080	68.19	8.	Maroko	256	175	68.36
13.	Danlando	2921	1955	66.93	9.	Madagaskaro	250	162	64.80
					10.	Novzelando	989	540	54.60
					11.	Islando	270	145	53.70
					12.	Argentino	815	415	50.92



45-a Universala Kongreso de Esperanto

Bruselo - 30.VII — 6.VIII.1960 - Belgujo

N-ro 15

Junio 1960

OFICIALA KOMUNIKO

Oficiala Antaŭkongreso: Arnhem
(Nederlando) 27—30 julio 1960;
Adreso: Pontanuslaan 7, Arnhem.

16-a Internacia Junulara Kongreso

Rotterdam (Nederlando) 23—30 julio 1960
Adreso: Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

Fakaj kunvenoj:

Internacia Scienca Asocio Esperantista anoncas fakkunvenon pri: "Kial oni iros al aliaj planedoj?"

Adreso: Prof. B. Popović, Zagrebačka 18 D, Sarajevo. Jugoslavio.

Dum la Universala Kongreso okazos framasona kunveno. Adreso: R. Van der Elst, rue des Egyptiens 12, Egyptenarenstr., Ixelles, Belgujo.

Ekskursŝanĝo

Laŭ peto de pluraj kongresanoj, la ekskurso al Antverpeno estas ŝanĝita de tuttaga al duontaga. Anstataŭ ĵaŭde ĝi okazos vendrede posttagmeze. La ekskursantoj havas nun la eblecon ekskursi ĵaŭde al Bruĝo aŭ al la Ardenoj kaj viziti la postan tagon la mondhavenon kaj arturbon Antverpeno.

Sonbendo:

Jenaj Esperanto-Societoj mendis la kongresan sonbendon: Bruĝo, Gento (Belgujo), Horska Bystrice (Ĉeĥoslovakio), Radio Parizo.

Operacio "Adoptaj gepatroj":

Jen listo de la lastaj aliĝintoj al la Operacio "Adoptaj Gepatroj": S-ro Schönrich (Germanujo), Debrouwere (Belgujo), Esperanto-Unuiĝo "Kompreno" (2 foje) (Germanujo) Esperanto-Grupo Münster (Germanujo), S-ino Wilma Diamant (Aŭstrujo), Kristana Esperanto-Grupo (KELI) en Stuttgart, (Germanujo), S-ino Julia Plyson (Belgujo), Skota Esperanto-Federacio (Britujo), Ges-roj le Vries (Nederlando), S-ro Heilberg (Usono), S-ro Ramirez (Hispanujo), Letchwort Esperanto-Societo (Britujo), S-ro J. R. Janssen (Nederlando), S-ro A. W. Thomson (Britujo), S-ino Karla Olsson (Svedujo), S-ro A. Wijnen (Nederlando), Kumla Esperanto-Asocio (Svedujo). Ĝis fino de majo estis kolektitaj por infanoj el landoj malproksimaj aŭ kun devizaj malfacilaĵoj 25.136.- b.fr. 63 esperantistoj ĝis nun aliĝis al la Operacio. Kotizoj ankoraŭ alvenadas.

La 5-a Internacia Infana Kongreseto publike dankas en la nomo de la infanoj.

Libera komedio:

La Internacia Arta Teatro de S. Flego ludos dum libervola spektaklo la komedion "Friponaĵoj de Skapeno" de Molière.

Nova filmo:

La firmo Gevaert decidis eldoni en la Internacia Lingvo la filmon "Lumĝermoj". La filmo estos prezentita dum la Universala Kongreso.

Belga vespero:

La Loka Kongresa Komitato decidis, ke dum la Kongresa dimanĉo okazu Belga Vespero, dediĉita al la kongreslando, dum kiu la kongresanoj informiĝos pri la vivo kaj aspektoj de Belgujo.

Antautempaj alvenintoj:

La Kongresejo (Palaco de Kongreso/ Palais des Congrès/Kongrespaleis), situanta sur la Monto de Belaj Artoj je 100 m. de la Centra Stacidomo, estos malfermita por la kongresanoj nur ek de la sabato je la 8-a h. Frualvenintoj dezirantaj viziti Bruselon bonvolu eviti nenecesajn vizitojn al la laborŝarĝita Kongresa Oficejo. Antautempaj kongresanoj povos renkonti unu la alian en la Kafejo "Monico Nord" apud la Norda Stacidomo, en Placo Rogier angule de Strato Brabanto.

Fervoja rabato:

La Jugoslavaj fervojoj decidis doni rabaton de 25% al la jugoslavaj kongresanoj veturontaj al la Universala Kongreso.

Parkadejo:

La Parkadejo en la Kongresejo donas 50% rabaton al la kongresanoj dezirantaj parkadi siajn veturilojn. La semajna karto estos aĉetebla en la Kongresejo ĉe la ĝiĉeto ekskursoj je prezo de 75.- b.fr.


Statistiko:

Ĝis la 15-a de junio aliĝis 1653 kongresanoj el 42 landoj.

Komunikoj:

La nuna estas la lasta komuniko pri la preparoj de la 45-a Universala Kongreso de Esperanto. La Loka Kongresa Komitato deziras al ĉiu bonan vojaĝon.

G. C. Fighiera,
Konstanta Kongresa Sekretario



La L.K.K. d la Eŭropa Ĉefurbo

Sur la bildo oni vidas: sidantaj en unua vico (de maldekstre dekstren) S-rojn L. Marré (Gazetara Servo), G. Maertens (vicprezidanto), M. Jaumotte (prezidanto), H. Sielens (vicprezidanto), S-ino J. Plyson (Loĝado), G. C. Fighiera (Konstanta Kongresa Sekretario). En la dua vico staras (de maldekstre dekstren): R. Jaumotte (Gazetara Servo), F. Volders, S-ino M. Weyn, Loĝado, J. Verstraeten, J. Oleffe (kasisto), R. Huyssmans (Ekskursoj), Prof. M. Roost (Somera Universitato), R. Jacobs (sekretario).

PRELEGVOJAĜO de D-ro HAMVAI

Kiam aperos tiuj ĉi linioj, ie sur la mondaj maroj inter Nov-Zelando kaj Nederlando veturos ŝipo, kiu alportos al Eŭropo la esperantistan paron D-ron Johano kaj S-inon Olga Hamvai. Li hungardevena, ŝi estondevena, kun familia lingvo Esperanto, nun fariĝintaj genovzelandanoj. D-ro Hamvai dum multaj jaroj speciale studis la folkloron kaj vivon de sia nova patrujo. Li estas survoje al Eŭropo kun materialo por kvin diversaj ege interesaj prelegoj. traktantaj la iaman kaj nunan vivon de la Maorioj, kaj ankaŭ la modernan Nov-Zelandon. Li alportos oficiale disponigitajn kolorajn diapozitivojn kaj koloran sonfilmon. Gesinjoroj Hamvai faros prelegvojaĝon tra Eŭropo en la laborsezono '60-'61, sub aŭspicioj de UEA. En multaj landoj la prelegoj

Daŭrigo sur kovrilo III

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de junio 1960

N-ro 328

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de majo kaj ankaŭ por komparo je la fino de majo 1959 :

	1959	1960
Asociaj membroj	6116	7926
Individuaj membroj		
MJ	742	710
MA	4860	4619
MS	486	528
Pat.	7	5
DM	336	349
HM	46	43
JMJ	23	24
JMA	153	171
	6653	6449
	12769	14375

DELEGITOJ

Argentino

Corrientes (Corrientes) FD (katolikismo): S-ro Bruno Ostropolski, Rom-katolika sacerdoto, Curia Eclesiástica 9 de Julio 1543.

Aŭstrujo

Graz (Stirio) FD (instruado): S-ro Josef Wesian, instruisto, St. Veit, Rannachstr. 3.

Kitzbühel (Tirol) D: vakas.

FD (katolikaj aferoj): vakas.

Brazilo

Belo Horizonte (Minas Gerais) FD (bestbredado): S-ro Geraldo A. Gomez de Pádua, bienisto, Rua Rio de Janeiro 1.599.

Ourinhos (São Paulo) D: S-ro Luiz Augusto Bartholomeu, ĵurnalisto, Rua Paraiba 114.

Rio de Janeiro (Estado da Guanabara) FD (arkitekturo): D-ro Hamilton Cunha Kozlowski, arkitekto, Rua Eleone de Almeida, 10 ap. 201, Catumbi.

Volta Redonda (Est. do Rio de Janeiro) FD (industria kalkulado): S-ro Antonio de Souza Barbosa, kontisto, Rua 42 No. 41.

Xapecó (Santa Catarina) D: S-ro Gersi Alfredo Bays, instruisto, Caixa Postal 74.

Britujo

Aberdeen (Skotlando) FD (ĵurnalismo): S-ro Sinclair Macintosh Florence, ĵurnalisto, 26 Seafiel Drive West.

Chesterfield (Derbyshire) D: S-ro K. G. Hague, instruisto, 73 Hawksley Ave., Newbold.

Croydon (Surrey) D: S-ro Leslie Hartridge, instruisto, 64, Laurier Rd., Addiscombe.

Dover (Kent) D: S-ro Norman Henry Smith, libera instruisto, 14B Castle Avenue.

Hexham (Northumberland) VD: F-ino Eileen Storey, tajpistino, Westfield, Anick Road.

FD (medicina teknologio): S-ro Leslie Holliday ĉefteknikisto en hospitala laboratorio, 22, Beaufront Avenue.

Johnstone (Renfrewshire) FD (literaturo): vakas.

Liverpool (Lancashire) D: S-ro G. L. Dickinson, fabrikeja laboristo, 21 Gribble Road.

FD (liberpensado): la D.

Todmorden (Yorkshire) D: vakas.

Bulgarujo

Vraca D: S-ro R. K. Tričkov, eksinstruisto, ulica "Tolbuĥin" 63.

Ĉeĥoslovakujo

Plzeň (Čechy) VD: S-ro Vladimír Váňa, ĉefvendisto, Křižíkovy sady 1.

Ĉilio

Santiago D: vakas.

FD (filatelio): vakas.

Finnlando

Laihia D: vakas.

FD (kristanismo): vakas.

Jokela (Uudenmaan lääni) JD: S-ro Matti Saveljeff, komizo.

Francujo

Asnières (Seine) FD (pripacaj aferoj): S-ro Jean Dalet, ŝtatoŭficisto, 79 bis rue du Château.

Boulogne-Billancourt (Seine) FD (radio-tekniko): vakas.

Clermont Fd. (Puy de Dôme) FD (meĥaniko), S-ro Jésus Orus, frezisto, 19 rue Pascal.

Cognac (Charente) D: vakas.

Creutzwald (Moselle) D: S-ro J. Manceau, inĝeniero, 9 Avenue Debussy.

Crevecoeur-le-Grand D: vakas.

FD (medicino): vakas.

Fontenay-aux-Roses (Seine) D: S-ro Robert Launay, PTT-ĉefdesegnisto, 3, Rue des Couloirs.

Hyères (Var) D: S-ro Maurice Feneyrol, teknikisto pri televidoaparatoj, "Esperanto-Domoto", Quartier Beauvallon.

Mouchin FD (PTT kaj radio-amatora elsendo): S-ro Jaques Luce, poŝtisto, route de Douai, par Nomain nord.

Oyonnax (Ain) FD (maŝinoj por modleblaj materialoj): S-ro René Guignot, mekanikisto, str. Emile Ecuyer 14.

Roubaix FD (PTT): vakas.

Sceaux (Seine) D: S-ro G. H. Clopeau, profesoro, Résidence des Pépinières, 12 Bd. des Granges.

Strasbourg FD (Eŭropaj aferoj): S-ro Hubert Férez, 4 Rue Stimmer.

Villeurbanne (Rhône) FD (geografio): S-ro Maurice Salzmänn, reprezentanto de libroeldonejo, 37, Avenue Henri Barbusse.

FD (literaturo franca): la FD (geografio).

Germanujo

Bonn (22c) (Nordrhein-Westfalen) D: S-ro Erhard Herlitze, fervojisto, Viktoriastraße 32.

Braunschweig (20b) (Niedersachsen) D: S-ro Rudi Biernath, teknika fervojista inspektoro, Ackerstr. 53 I, r. FD (fervojo, maŝin-tekniko): La D.

Niedermarsberg (Westfalen) FD (tekniko) S-ro Mirko Toth, seruristo, Bredelar Str. 46.

Osnabrück (Niedersachsen) FD (fervojoj): S-ro Otto Rösemann, fervojoficisto, Koksche Str. 44.

Hispanujo

Barcelona FD (Filatelaĵoj Esperantaj): S-ro Evaristo Gil, oficisto, apartado 875.

Manlleu (Barcelona) D: S-ro Bartolomé Costa, masonisto, str. Victor Pradera No. 25.

Pontevedra (Pontevedra) D: S-ro Antonio Alonso Núñez, statistikisto, Michelena 16-4.

FD (statistiko): La D.

Valladolid (Valladolid) D: S-ro Mariano Cantalapiedra, presisto kaj desegnisto, strato Montero Calvo 12/III.

Italujo

Roma FD (medicino): D-ro Enrico Dondi, kuracisto, Via Senafè 19.

Schio (Vicenza) FD (fabrikado de lanteksaĵoj): S-ro Giuseppe Zambon, teks-desegnisto, Albergo Dolomiti.

Kongo Belga

Elisabethville (Haut-Katanga) D: vakas.

Nederlando

Hilversum (Noord-Holland) D: F-ino A. J. Middelkoop, profesorino pri klasikaj lingvoj, Jonkerweg 11, Hilversum.

Nov-Zelando

Palmerston North D: S-ino Daisy Morgan, 64 Guy Avenue.

Pollando

Katowice (Górny Śląsk) JD S-ro J. J. Terenda, studento, strato Kościuszki 33/8.

Prusków (woj. Warszawa) D: S-ro Kazimierz Kwasiborski, instruisto, ul. Sobieskiego 12.

FD (fotografado): la D.

Wrocław (Dolny Śląsk) VD: S-ro Aleksy Lasinski, ĵurnalisto kaj radia redaktoro, ul. Dolnobrzeska 8 m. 6, aŭ Pola Radio Wrocław.

JD: S-ro Janusz Zych, studento, Sienkiewicza. 123/6.

FD (elektroenergetiko): S-ro Stanisław Fortuna, mgr. inĝ. pri elektroenergetiko, str. Korfantego 16.

FD (juro): S-ro Naftali Salamon, advokato, Barlickiego 33.m.12.

FD (muziko): S-ro Jan Smykalski, profesoro pri muziko, str. Tramwajowa 2a m. 7.

FD (okulistaj aferoj): D-ro J. W. Drak, okulisto, str. Obrońców Pokoju 16/8.

FD (radio-ĵurnalismo): S-ro Aleksy Lasiński, ul. Dolnobrzeska 8 m. 6.

Rumanujo

Bucuresti FD (stenografio): D-ro Aurel Boia, profesoro, str. Căuzasi 7.

Sovet-Unio

Dĵambul (Kazaĥskaja SSR) D: S-ro V.A. Kondratjuk, kuracisto, 1 per. Kirova 20.

Gorĵki (Rossijskaj SFSR) VD: S-ro I. J. Ŝavkun, teknikisto-mekanikisto, prospekt kirova 8A-1.

Kiev (Ukrajnskaja SSR) VD: P.P. Vasilĉenko, inĝeniero de laktmastumado, Bogomolca 5, kv. 20.

Kiŝinev (Moldavskaja SSR) D: S-ro E. Nikitin, inĝeniero-radiokonstruisto, str. Puŝkin 15.

FD (radio-elektrofiziko): la D.

Leningrad VD: S-ro Fjodor I. Kolobanov, pensiulo, ul. Rubinŝtejna 8, kv. 25,

Moskva VD: S-ro E.T. Salnikov, kuracisto, Moskva B 95 ul. Bol. Ordinka 56, kv. 4.

FD (esperanto-instruado): S-ro J. V. Voleviĉ, pensiulo, Leningradskoje ŝosse 9/2 kv. 4.

FD (fiziologio): la VD.

Odessa (Ukrajnskaja SSR) FD (dragŝipaj aferoj): S-ro A.I. Verŝinin, inĝeniero, ŝip-mekanikisto, Poŝtkeŝto 256.

Petropavlovsk (Kamĉatskij) D: S-ro A.V. Liĉ seruristo, Poŝtkeŝto 109.

Rostov-Don (Rossijskaja SFSR) VD: S-ro S. N. Kletenik, horloĝisto, Engels 111.

FD (horloĝoj): la VD.

Vilnius (Litova SSR) D: S-ro Juozas J. Petrulis, etnografiisto, Latviu 58-2.

FD (kulturaj aferoj): la D.

Svedujo

Angelholm (Skåne) VD: S-ino Elsbeth

Norström, kontoristino, Bruksgatan 36.

Åstorp (Skåne) D: S-ino Karin Forsell, kontoristino, Hagagatan 18.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Couto, S-ro Joaquim do, Niteroi, Brazilo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

486 Feldmayr, S-ro A., Burwood, Aŭstralio.

487 Debrouwere, S-ro G., Kortrijk, Belgujo.

488 Albuquerque, D-ro José J. de, Maceio, Brazilo.

489 Almada, S-ro Francisco de S., São Paulo, Brazilo.

490 Araujo, S-ro Got. Soares de, Rio de Janeiro, Brazilo.

491 Caymmi, F-ino Viv. de M., Salvador, Brazilo.

492 Gama, S-ro João de Oliveira, Juiz de Fora, Brazilo.

493 Goes, S-ro Kap. Godofredo de Araujo, Salvador, Brazilo.

494 Juruena, S-ino Clara Alvina Zuhlke, Rio de Janeiro, Brazilo.

495 Knoedt, S-ro Leopoldo Henr., Salvador, Brazilo.

496 Neves, S-ro Divino, Boa Esperança, Brazilo.

497 Nunes, S-ro E. Pereira, São Paulo, Brazilo.

498 Oliveira, S-ro Lauro Jorge de, Santos, Brazilo.

499 Peccioli, S-ro Italo, Jaú, Brazilo.

500 Peixoto, S-ro O., Niteroi, Brazilo.

501 Pitta, S-ro Hermes, Salvador, Brazilo.

502 Souza, S-ro D.P. de, Rio de Janeiro, Brazilo.

503 Souza, S-ro João Bat. de Melo e, Rio de Janeiro, Brazilo.

504 Varanda, S-ro José, Terezopolis, Brazilo.

505 Villa Nova, S-ro Thomas T., Recife, Brazilo.

506 Wehrs, F-ino E., Niteroi, Brazilo.

507 Clarke, S-ro Herbert, Manchester, Britujo.

508 Møller, S-ino Ellen, Fåborg, Danlando.

509 Brink, S-ro Dirk M., Hong Kong

510. Sgroi, S-ro Rag. Rosario, Cibali Italujo.

511 Frutoso, S-ro Paul, Meknés, Maroko.

512 Diamant, S-ro Gösta, Göteborg, Svedujo.

513 Hedgren, S-ro Nils, Hägersten, Svedujo.

514 Kjellgren, F-ino Jenny, Murjek, Svedujo.

515 Lind, F-ino Estrid, Stockholm, Svedujo.

516 Ljungberg, S-ino Astrid, Svedujo.

517 Lundgren, S-ro Rune, Uppsala, Svedujo.

518 Olsson, F-ino Agda, Göteborg, Svedujo.

519 Olsson, S-ro Hj., Stockholm, Svedujo.

520 Turner, S-ro Fred, Linköping, Svedujo.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo: 18.244,92 gld.

F-ino O. Ihander, Finnlando 2.30 gld.; Germ. Esp. Ferv. Asocio 8.12 gld., Leo Funken 4.51 gld., Germanujo; A. Bohigas, Hispanujo 1.57 gld.; N. N. en V., Nederlando 25.— gld.; Erik Carlén, Svedujo 8.01 gld.

Entute 18294,33 gld. je 1.6.1960.

Donacu unu milonon — aŭ pli! — de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo! Ankoraŭ ne ĉiuj elspezoj por la Zamenhof-Jaro estas kovritaj. . . .

DONACOJ AL ĜENERALA KASO

S-ro J. Course, Britujo 3.96 gld., S-ro R. Barta, Usono 3.18 gld., S-ro Dang-Van-Phai, Vietnamo 1.32 gld.

DONACOJ AL A.P.O.

F-ino N. Hanson, Britujo 52.90 gld., S-ro A. Criach, Hispanujo 3.46 gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,

Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Belga Turista Servo: Ĉian informon turistan prizorgas R. Loeckx, Konijnenperken 109, Bruselo 17, Belgujo, kontraŭ respondkupono. Modesta ĉambro ekde 50 F. en Bruselo-Centro havebla. Tel. 72 32 22.

Mi korespondas kun ĉiu interesulo, precipe kun lingvano ne apartenanta al la hind-eŭropa lingvaro, pri: kio en E estas facila por vi, kio ne! Kio plaĉas al vi, kio ne! Ĉio rilate al strukturo, gramatiko, afiksaro, vortmaterialo kaj formado ktp. Atentu mian jubilean anoncon en jarlibro 1959, p. 332! H. Dresselhaus (Brockmann) en Schloss Holte, Westf., Germanujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Gasthuisstraat 68, Tilburg, Nederlando.

La nova kristaneco, bazita je la doktrino de sciencisto kaj reformanto, E. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religon kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Lužická 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

La Budha Lumo — Organo de la Budhana Ligo Esperantista; Jarabono: 4 ŝilingoj. Kasistino: M. E. Bowden, "Clarach", Abbey Drive, Gronant/Prestatyn, N. Wales, Britujo.

Kristana Bulteno, monata gazeto de liberala religio, nun estas en sia kvina jaro. Jarabono \$ 1.50; provekzemplero senpage. Adreso: Donald Broadribb, Collins, N. Y., Usono.

Skoltoj en 19 landoj abonas al "La Skolta Mondo" kaj Skolta Esperantista Ligo. Informpetu ĉe Charles Bardsley, 42 Westbourne St., Oldham, Lancs., Britujo.

El pedagogoj ĉiulandaj mi petas ilian lernejsistemon. Poŝtrevene mi resendas la skemon de hungara lernejsistemo. Bonvolu bele afranki la kovertojn. D-ro Szerdahelyi István, Budapest VIII, Szigetvári 22.II 4.

Japana elementa lernejo deziras interŝanĝi desegnaĵojn de gelernantoj. Adreso: Nagara Syôgakkô (Nagara elementa lernejo) Ootu-si, Siga-ken, Japanujo.

Kio estas "dovrasoleismo"? Doktrino antaŭvidanta finan venkon nur post esperantistiĝo de almenaŭ unu tuta urbo. La rimedo? Enmigrado de vi, samideanoj liberaj! Vivcelo de D. Soleo: ke ĉiu 35a loĝanto de Dovro parolu Esperanton. Samtempe celas solvi problemon de rifuĝintoj per aĉetado de domoj, kreado de peresperanta laborebleco, lernejo ktp. D. Soleo, Esperanto-Civito, 14B Castle Avenue, Dover, Britujo; aŭ rendevue en Bruselo.

S-ino Letendre, St-Laurent-de-Brève-dent, Seine-Maritime, Francujo, petas bildkartojn el via lando, montrantajn "Patrinon kun infano"; nepre respondos.

275 diversajn germanajn poŝtmarkojn mi donas kontraŭ 200 div. el via lando.

Friedrich Herbst, Glockenstr. 20, Düsseldorf 10, Germanujo.

IKS-Internacia Korespondservo informas ĉiujn aliĝintajn tradukistojn, subtenantajn organizaĵojn kaj gazetojn, ke la organizo de la afero daŭras pli longtempe ol ni pensis. Ni atendas ankoraŭ la respondojn el aziaj kaj sudamerikaj landoj. Ni dissendos baldaŭ la duan informilon. Urĝe ni petas la ne-respondintajn Landajn Asociojn kaj Esperanto-gazetojn respondi je nia unua informilo. Provizora IKS-oficejo Crailsheim (Germanujo).

Aŭstraliaj gimnazianoj 13-jaraj deziras korespondi kun similaj en Eŭropo, Azio precipe Japanujo kaj Indonezio, kaj Sud-Ameriko. Adreso: Esperanto-kurso, Adelaide Technical High School, Adelaide, Aŭstralio.

Nova "Esperantista Grupo Sondrio", Via Caimi N. 8, Sondrio (Italujo), petas sendi ĉian esperantaĵon por propaganda ekspozicio, ne pli poste ol fine de oktobro 1960.

21-a Hispana Esperanta Kongreso (Pontevedra, 21a-24a julio). Filmo, teatraĵeto, ekzamenoj antaŭ gravuloj, folkloro, rava ekskurso kaj..... Hispanujo!! Ĉion vi ĝuos, kaj vi ebligos ke la aniĝo de 413 gejunuloj ĉe Pon-

tevedra Esperanto-Klubo ne estu nura unufajrera entuziasmo. Ni kore atendas kaj gastigos vin!! Eksterlandanoj aliĝas senpage. Ankaŭ ili havas fervoran rabaton. Informojn: Esperanto, Pontevedra, Hispanujo.

Grava hispana gazeto pri konstruaĵoj, bezonas seriozajn gekorespondantojn por akiri fotojn de modernaj konstruaĵoj. Rekompencos aŭ ŝanĝos, laŭdezire. Respondo garantiata. S-ro Juan Farré, Avda. José Antonio 432, Barcelona (15), Hispanujo.

Ni dankos kaj rekompencos al ĉiuj la sendon de bele afrankitaj pk., gazetoj kaj Esp-aĵoj por nia ekspozicio okazonta komence de oktobro dum la jubilea festo de nia klubo: "Esperanto" Clube dos Lisboetas, c. postal 793, Lourenço Marques, Mozambiko, Orienta Afriko.

Senmanaj pentristoj. Ĉar mi intencas verki libron pri la invalidaj pentristoj, mi deziras la helpon de la tutmonda esperantistaro: Sendu al mi nomon kaj adreson de artistoj, kiuj pentras perbuŝe aŭ perpiede, kaj informu min pri tiaj artistoj jam mortintaj. Mi rekompencas laŭ via deziro. Bonvolu represi la alvokon! Poul Jorgensen, Borglum, Vraa, Danlando.

Daŭrigo de p. 138

jam estas fiksitaj. D-ro Hamvai, kiu estas ankaŭ bonega Cseh-metoda instruisto, estas preta fari ankaŭ rapidkursojn.

Kelkaj el liaj prelegoj bonege taŭgas ankaŭ por prezento en mezlernejoj. Ni tre rekomendas al la diverslandaj organizantoj enkonduki Gesinjorojn Hamvai en instruistajn kaj ĵurnalistajn mediojn.

La prelegoj estas vivantaj ekzemploj de la funkcio, kiun havas Esperanto sur la kampo de geografia kaj de interŝanĝo de kulturaj valoroj.

Post sia alveno en Rotterdam Ges. Hamvai veturos rekte al la Kongreso en Bruselo. Ankaŭ tie ili prelegos. Eventuale oni povos skribi por ili ĉu al Bruselo, ĉu al la Centra Oficejo de UEA.

Dir. C. O.

La novaj moneroj



La apuda bildo montras la novajn stelomonerojn.

La dekstela monero havas blankan nikelecan koloron, portas la bildon de Zamenhof kaj la tekston: "D-ro L. L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, 1859—1917". La kvin-stela, montrante bildon de terglobo, havas flavkuplecan koloron kaj portas la tekston: "La mondo estas unu lando, la homaro unu popolo". La unustela peco, de ruĝkupleca koloro, surhavas la emblemon de Universala Ligo kun la teksto: "Unu mondo, unu lingvo, unu mono". Ĉiuj moneroj portas la jaron 1959. Ja kvankam nur nun la moneroj estas liveritaj, la mendo estis farita en 1959, la Zamenhof-Jaro.

La ideon por la desegnaĵoj kaj tekstoj donis Sinjoro Andreo Cseh. Profesia gravuristo de la Ŝtata Monfarejo nederlanda ellaboris ilin.

Poŝtmarkkomercistoj kaj Filatelistoj !

JE PLEJ MALALTA

prezo ni liveras, abone, novaĵojn kaj unuata-
gajn kovertojn de tuta Skandinavio aŭ de
aparta lando.

De ĉiuj landoj ni aĉetas ĉiajn kilo- kaj
amasvarojn.

Mendojn kaj ofertojn bonvolu direkti al

**Holger Aaskov, Bredgade 73,
Kopenhago K. Danlando**

Kie troviĝas la filmo

'Sub la ombro de Hiroŝima?'

S-ro Axel Fridén, Falköping, Svedujo, pruntis la
filmon post la UK en Varsovio kun la intenco
kunporti ĝin al Svedujo. Bedaŭrinde s-ro Fridén
mortis en oktobro 1959, kaj en liaj havaĵoj la filmo
ne estas trovebla.

La malapero de la filmo signifas grandan
monperdon por la posedantoj, kaj ni estos tre dan-
kemaj, se tiuj kiuj povas doni iun ajn informon
pri la sorto de tiu filmo post la varsovia UK
volus skribi al

**Skaraborga Esperantodistrikto, Åke Blomberg,
Lottkällsgatan 2, Lidköping, Svedujo.**

Oficiala Bulteno

DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

N-ro 2 aperis kaj enhavas artikolon de la prez.

Inĝ. J. R. G. Isbrucker :

"Pri la Vortfarado en Esperanto".

Disvendas U.E.A. Prezo : 1,50 gld., 6 steloj.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton

32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande : Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7 Av. Léon-Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine) Francujo.

Administracio: 5 Bd. Stalingrad
Nice (A.M.)

La Memorlibro

pril la

Zamenhof-jaro

estos aĉetebla en la

Brusela Kongreso!

Prezo: 12,50 gld.

50.— steloj

Havigu al vi ĉi tiun valoran verkon!

Eldonis C.E.D.

Mendu ĉe U.E.A.

Unua kaj unika libro pri fiŝoj en Esperantujo

Sekretoj de la Marestaĵoj

de Petar Giunio

reverkita de Lic. Marinko Ĝivoje

aperos baldaŭ sub aŭspicioj de UEA

"Scienca laŭ enhavo ĝi estas beletra laŭ vestaĵo"
— diras pri ĝi E. Balech en la enkonduko.

En ĉi tiu interesega, streĉa kaj instrua romano
pri marestaĵoj la aŭtoro senvualigas al ni la
sekretojn ekde la mikroskopaj estaĵoj ĝis la plej
grandaj fiŝoj kiuj vivas en la maro — lulilo de la
vivo sur nia planedo.

Riĉaj plurkoloraj ilustraĵoj kaj abunda listo de
fakterminoj kun difinoj kaj plurlingvaj ekvivalen-
taĵoj pliriĉigas la valoron de ĉi tiu verko.

Jen titoloj de kelkaj ĉapitroj: Nevidebla martre-
zoro; Defendo per kemiaj armiloj; Interesaj koope-
rativoj; Bestoj kun inkujo; Lertaj aviadistoj; Fiŝoj
aŭdigantaj voĉon; Venenaj fiŝoj; Fiŝo kun segilo
ktp.

Provizora prezo : 5.— gld., 20 steloj.

Mendu ĝin jam nun ĉe U.E.A. !



Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam